

LINGVO * LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapeŝt, IX. Soroksári út 38. V. 6. Hungarujo. Aparte aĉetebla. Unu numero kostas 0.05 USA dol. aŭ egalvaloron. Tri numeroj kune ekspektataj kostas nur 0.10 USA dol. aŭ proksimuman egalvaloron.

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Aperas kvaronjare. Nro 1. 1938

ANTAU LA NOVA KRESTOMATIO

Certe, unu el la plej gravaj dokumentoj de nia lingvo, unua fonto de la Esperanta stilo estas la Fundamenta Krestomatio. Eldonita de Zamenhof en 1903, ĝi pruvis, ke la lingvomaterialo solidiĝis, elproviĝis, akiris internan riĉon per plifleksebligo, ke la lingvo estas uzebla en plej diversaj kampoj (beletristiko, poezio, sciencoj), ke la baza lingvokonstruo estas taŭga kaj firma. Krome, ĉar la tekstoj de la verko estas verkitaĵoj aŭ reviziitaj de Zamenhof, ĝi donis ankaŭ modelon de stilo, obligante, ke la verkistoj, per ĝia studado, alproprigu kaj imitu la lingvovozon de la lingvo-aŭtoro, kiu, laŭ la Bulonja deklaro, «plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj plej bone konas ĝian spiriton».

Longtempe, efektive, la Fundamenta Krestomatio havis netakseblan valoron kiel garantio de lingva unueco kaj kiel modelo de stilo. Ĝi estis ne nur legaĵo kaj lingva konsilanto, ĝi estis — kaj estas — io pli, fundamenta ŝtono de nia literaturo.

Sed intertempe pasis 35 jaroj, kaj sur tiu fundamento konstruiĝis tuta palaco. Ankaŭ la lingvo riĉiĝis, evoluis, plipotenciĝis de tiam: ĝia esprimpovo pligrandiĝis, ĝia sintakso klariĝis kaj plifirmiĝis. Kaj kiel ajn grava estas la Fundamenta Krestomatio, ĝi iĝas, pli kaj pli, historia dokumento. Ĝi montras al ni ankoraŭ komencan, primitivan stadion de lingvo kaj literaturo: ĉe ĝia apero la literatura evoluo de nia lingvo ja apenaŭ komenciĝis; nur poste venis la internacia periodo en la historio de Esperanto, nur poste komencis ĉiuj popoloj vaste kontribui al la komuna lingvotrezoro. Jam en la antaŭparolo al la dua eldono Zamenhof mem konstatas, ke ĉe la trarigardo de la unua eldono li trovis diversajn esprimojn, kiuj sisteme ŝajnis al li bonaj, sed kiuj nun al li ne plaĉas kaj kiujn li volonte ŝanĝus. Kaj vere, la Fundamenta Krestomatio lingve jam iom arkaikiĝis, ĝi ne estas montrilo eĉ de la Zamenhova stilo (la plej gravaj verkoj de Zamenhof kreis nur poste), des malpli ĝi reprezentas la nunan staton lingvan kaj literaturan.

Estis do plene motivita la aperigo de verko, kiu havu pri nia nuna lingva posedaĵo la saman resuman signifon, kiel la Fundamenta Krestomatio havas pri la tiam aŭtore.

Tial jam antaŭ longe oni pensis pri la kompilo de Nova Krestomatio. Ĝin iniciatis unue d-ro Emil Pfeffer, sed pro diversaj kaŭzoj li ne povis ĝin efektiviĝi. Poste S. Grenkamp-Kornfeld ekhavis la saman ideon kaj ankaŭ serĉis kunlaborantojn — sed la afero denove ekdormis. Tamen, tia valora kaj necesa afero ne povis droni definitive. En 1934 Pfeffer kaj mi ree intertraktis pri la demando, ni ankaŭ publikigis en «Lingvo-Libro» alvokon, serĉante kunlaborantojn. Eĉ unu respondo ne venis. Tiam Pfeffer ellaboris detalan

planon, amasigante vere interesan kaj valoran materialon. Mia tasko estis ĝin kribri kaj kompletigi.

Dum tiu laboro mi pli kaj pli konvinkiĝis, ke tia Krestomatio ne povas konsisti nur en la sensistema vicigo de interesa lego-materialo: ĝi devas esti alia ol simpla Legolibro aŭ Antologio. Por distingiĝi de ĉi tiuj, ĝi devas havi ian gvidlinion. Kaj ĉi tiun gvidlinion mi kredis trovi en la kompleto: la libro devas enhavi ion, laŭeble plej karakterizan, de ĉiu aŭtoro, kiu per valoraj verkoj partoprenis en la konstruo de nia literaturo; ĝi devas montri la plenan internaciecon de nia beleto, enhavante ion tradukitan el ĉiuj lingvoj, kies trezoroj estas interpretitaj en nia lingvo; ĝi devas montri la lingvistan laboron de ĉiuj, kiuj per valora laboro kontribuis al la esperantologio; ĝi devas respeguli ankaŭ nian movadon. Ĝi do devas ilustri per verkoj nian literaturhistorion, ĝis nun ne verkitan, sed ĝerme jam enhavatan de la Enciklopedio de Esperanto, sub diversaj gvidvortoj. Nur tiamaniere la verko havos ankaŭ tiun pedagogian signifon, kiun pretendas la titolo Krestomatio.

Sed prezenti karakterizan kolekton el la verkoj de la lingve, historie aŭ literature plej rimarkindaj aŭtoroj: pecojn prozajn kaj poeziajn, literaturajn kaj sciencajn, originalajn kaj tradukitajn, evidente ne estas eble en unu sola volumo havanta la amplekson de la Fundamenta Krestomatio. Tial la materialon mi devis dividi en tri volumojn.

La unua volumo enhavos originalaĵojn: fabelojn, rakontojn kaj poezion. La dua respondo al la dua partoj en la Fundamenta Krestomatio: «El la vivo kaj sciencoj» kaj «Artikoloj pri Esperanto». Fine la tria donos tradukojn: rakontojn kaj poemojn.

Tiel ni havos imponan dokumenton pri nia lingva kaj literatura riĉo.

Restas ankoraŭ preparoli la demandon de la stilo. Oni povus opini, ke la libro havos pli da lingvohistoria valoro, se oni represas ĉion sensange, ĉar tiamaniere ĝi respegulos ankaŭ la evoluon de la lingvo. Sed oni devas pripensi, ke, unue, malgataĵoj, mallertaj, eraroj kaj stumbloj lingvaj tre ofte devenas ne el la senevolueco de la tiam lingvo, sed el la senevolueco de la aŭtoro; due, ke tia Krestomatio devas servi ankaŭ kiel instruilo de stilo, do lingve ĝi devas esti *modela*. Tial, kun tre granda takto kaj singardo, ni ne hezitis ekstermi el la tekstoj ĉion, kio al ni ŝajnis ne konforma al la spirito de la lingvo. Ankaŭ en la poemoj, ni faris kelkloke ŝanĝetojn, teknikajn mallertaĵojn ni klopodis elimini, konfuzajn frazojn pliklarigi. Per tio ni sukcesis savi kelkajn poemojn kun bela kerno, kiujn ni estus devintaj elasi pro nepardonablaj pekoj.

Praesperanto II.

— G. Waringhien —

I.

La sekvanta peco estas fragmento de artikolo, kiun Zamenhof verkis por »La Revuo«, en la tempo de la Idista afero. Carlo Bourlet opiniis ĝin nekoniema al la cirkonstancoj kaj eble danĝera. La origina teksto verŝajne malaperis kun la dokumentoj konservitaj de De Mesnil en sia kampodomo, kiu estis bruligita dum la milito 1914—18. La kopio, kiu servis al ni por la eldono, estis farita de S-ro Aymonier, kiu afable ĝin disponigis al ni. (La traduko de la pra-Esperanta citaĵo estas nur hipotezo de mi mem.) G. Waringhien.

[En 1878 aperis »Lingve Universala«, sed de tiu tempo]... mi du aŭ tri fojojn radikale ŝanĝis la lingvon. Ĉiufoje post tia ŝanĝo mi fervore kaj tre multe verkis, proze kaj verse, originale kaj traduke, por ĉiuflanke elprovi la lingvon. Bedaŭrinde ĉiuj manuskriptoj el la antaŭhistoria tempo de Esperanto tute malaperis.

En mia memoro ankaŭ restis preskaŭ nenio el tiu tempo. Mi nur memoras, ke en la komenco la lingvo havis tre grandan abundon da gramatikaj formoj (el ili ekzemple la pasivo de la verbo restis ankoraŭ larĝe post 1878, la pluskvamperfekto (r?) estis ankoraŭ en 1881, la imperfekto, kies finiĝo estis »-es«, restis en la lingvo ankoraŭ eĉ en la komenco de 1887, grandan abundon da vortoj, kaj precipe grandan abundon da afiksoj. Mi memoras, ke en la unua tempo mi kun speciala pasio okupadis min per serĉado de diversaj »reciprokaj rilatoj inter la vortoj«, kaj ĉiun trovitan rilaton mi fiksas per ia afikso. Ekzistis ekzemple afiksoj por »provizi per io«, »provizigi per io«, »abunda je io«, »akiri (aŭ atingi) per io«, »fari ion ĝis sate«, »fari karakterizan agon per io«, »fari ion reciproke«, »fari koncerne ion (germana be-)«, »posedanto (mastro) de io« ktp. Ekzistis ambaŭ participaj sufiksoj por la kondicionalo kaj imperativo (la lasta en la senco de devo: *kiu devas fari, kiu devas esti farata*); la sufiksoj »ebl« kaj »em« havis duoblan formon, aktivan kaj pasivan; ekzistis ne sole sufiksoj por la monatoj kaj semajnaj tagoj, sed eĉ speciala formo por esprimi la rilaton inter *doni* kaj *preni*, *vendi* kaj *aĉeti*, *instrui* kaj *lerai* ktp. Paralele al la radikoj (kies tiaman formon mi nun ne memoras precize, sed donas nur proksimume) *vid*, *aŭd*, *flad* (senti per la nazo), *palb* (senti per palpado), *gud* (senti per la gusto), *svaz* (konvinki), *prov* (sperti), *trov*, *pruv* ktp. ekzistis simetrie la serio: *vit* (rigardi), *aŭt* (aŭskulti), *flat* (flari), *palp* (palpi), *gut* (gustumi), *trof* (serĉi), *svas* (peni konvinki), *prof* (provi), *pruf* (argumenti) ktp. El tiu serio, kvankam ne tute analogie restis ankoraŭ ĝis nun la vortoj »pezi« kaj »pesi«.

Poste venis periodo de reago. Kosciante, kiel terure malfacila estos la propagando en la unuaj jaroj, kaj kosciante, ke rompi la unuan glacieron mi povos nur en tia okazo, se mi prezentos al la mondo ion *eksterordinare facilan*, mi komencis per ĉiuj fortoj premi la

antaŭe ekzistantan lingvan materialon, elĵetadi ĉian »balaston«, t. e. ĉiujn vortojn kaj formojn, kiuj por la unua komenco ne estis nepre necesaj, kaj celadi al tio, ke la tuta lingvo, necesa por la unua tempo, trovi lokon sur malgranda folieto. Mi sciis, ke pliriĉigi la lingvon (per vojo de neologismoj) oni tre facile povos poste, kiam la mondo jam sufiĉe alĉutimigos al la plej necesa fundamento.

La supersignitaj konsonantoj havis dum longa tempo la formon »ĉ« (= ĉ), »ĵ« (= ĵ), »dĝ« (= ĝ), »ŝ« (= ŝ); poste mi enkondukis alian formon por la sonoj ĵ, dĝ (por interpagi la fonetismon kun la grafismo), kaj al la supersigno mem mi donis alian aspekton por diferencigi ĝin de la vokala akcento (kiu dum longa tempo estis uzata por la verbaj formoj anstataŭ la finiĝo s).*

Mi diris... [ke la manuskriptoj de la antaŭhistoria epoko de Esperanto malaperis; sed mi ĵus retrovis manuskripton el la jaro 1881, el kiu mi prenas la jenan pecon]:

[El: La Umbo. Vidu poste en n-ro 10.]

Un sero la frindoro sidk jal ba sa balko, bi ro il kambre brula
Unu vesperon la fremdulo sidis sur sia balkono, post li en-la kambro brulis
lando, e fej esth tute nature hu la umbo vididha bal muro
kandelo, kaj tial estis tute nature, ke la ombro vidigis sur-la muro
del bloa balko. Si, en ro fi sidh bloe bul floroj bal
de-la kontraus balkono. Jes, jen li tie sidis kontraus inter-la floroj sur-la
balko e ciul fio kvan la frindoro sol mova, mova-sol la umbo os,
balkono-kaj ĉiun fojon, kiam la fremdulo sin movis, movis sin la ombro ankaŭ,
kor fe ro cian fakte. "Mo pags, na umbo este la sola viva, kvul
far tiel li ĉiam faras. Mi pensas, mia ombro estas la sola viva (estato) kiam
e gota fi trovi!" pailu la stuttoro "Vitto gu kve gracie ro sidh
oni povas tie trovi!" parolis la instruitulo. "Rizardu, kie? gracie li sidas,
bul floroj, la verbo este koj fermata, e nuk la umbo debas (?)
inter-la floroj, la nordo estas nun fermetita, kaj nun la ombro devas
esti fe sadha e ialli e obvitti ĉiol ie e beje revionente narri
esti tiel safa kaj eniri kaj pririgardi ĉion ene kaj poste reveninte narri
a mo kvul ro fi vidu. Si, to debas habi il pintoj ma vando i"pailu (?)
al mi, kion li tie vidis. Jes, vi devas havi en-la perso! mian utila(?)!" parolis
ro bade. Este fe bona e ialli! Nu ne vola to alli?" e ro vupigu la
li Serce. Estu tiel bona kaj eniru! Nu, ne volas vi iri?" kaj li balancis la
kapo al-la umbo e la umbo vupigu ree. "Si, si, allo, saĝ ne tajm
kanon al-la ombro, kaj la ombro balancis ree. Jes, jes, iru, sed ne restu (?)
prej longe!" La frindoro sol levu e ra umbo bal bloa balko
tre (?) longe!" La fremdulo sin levis kaj lia ombro sur-la kontraus balkono
os sol levu....
ankaŭ sin levu....

La legantoj eble miros, ke dum teksto el la jaro 1878 (peco estis publikigita en mia »Letero pri la deveno de Esperanto«) estas por ili sufiĉe komprenebla, la nun presata teksto el pli posta tempo estas por ili preskaŭ tute nekomprenebla! La kaŭzo estas jena: pro motivoj, pri kiuj mi nun ne povas paroli pli detale, mi en tiu tempo havis la konvinkon, ke, kvankam la vortoj teknikaj

* En la originalo la slavajn supersignojn anstataŭas simpla superkomo, laŭ la klišoj; tiun ni ne povis reprodukti manka de literotipoj.

Se iu protestus kontraŭ tia agmaniero, li pripensu, ke, unue, Zamenhof mem korektis ĉion nepropran en la Fundamenta Krestomatio, ni do sekvas nur lian ekzemplon; due, ĉe kelkaj Esp-aj gazetoj la redaktoroj kutime korektis ĉiun ensenditan artikolon, ni do kompensas nur la taskon de tiuj redaktoroj, kiuj tion, ĉe aliaj gazetoj, ne faris.

Ne ĉiuj artikoloj kaj poemoj havas, kompreneble, egalan valoron en la libro. Nia literaturo estas juna,

lingvo kvindekjara estas ankoraŭ infano. Sed eĉ se nia literaturo ne estas komparebla al la literaturo de la naciaj lingvoj, precipe al tiu de la lingvoj grandaj, ĝi estas jam tamen trezoro, pri kiu ni ne devas honti, kaj en kiu jam troviĝas pecoj valoraj eĉ laŭ la plej severa konsidero. Pri tio mi volis doni dokumenton en ĉi tiu trivoluma Krestomatio.

K. Kalocsay

kaj ankaŭ ĉiuj novaj enkondukotaj vortoj devas esti prentaj sensaŝge en tiu formo, en kiu ili ekzistas en la naciaj lingvoj (por ebligi facilan kaj liberan evoluadon de la lingvo), tamen por la vortoj fundamentaj (t. e. plej multe uzataj en la ordinara vivo) la nacilingva aspekto ne sole ne estas necesa, sed estas eĉ rekte malhelpa, kaj tial mi tiam tute ŝanĝis la plimulton de la vortoj konforme al tiuj principoj, kiuj tiam ŝajnis al mi la plej gustaj.

La i antaŭ aŭ post vokalo estis tiam elparolata kiel »j», ekzemple »fiu» estis legata »fju». Kvankam la vortoj eble ŝajnos al la leganto tute elpensitaj, ili tamen ne estis tiaj, sed ili estas vortoj naturaj, kiuj estas nur alkonformigitaj al mia tiam principo, ke en la vortoj fundamentaj la oportuneo estas pli grava, ol la internacieco. Ekzemple *il* (-(estis)-) *in la* (en la), alkonformigita al la tiam lego, ke prepozicio devas esti ne sole plej mallonga, sed ankaŭ finiĝi per vokalo, por ke ĝi povu unusilabe kunfandiĝi kun la ĝin sekvanta artikolo; *kala* estas oportunigita formo de la latina »calidus» (varma); *palli* anstataŭis la antaŭan malbonsonan *parli* (paroli); *rajiŝi*

konsistas el la vorto *rajo* (oportunigita »radio») kaj la tiam ekzistinta sufikso *iŝ* (kiu servis por verbigado de substantivo), ktp. La vortetoj, kiel *ust* (germana »erst»), *aŝ* (pola »aż»), *des* (franca »des») ktp. apartenas al tiuj vortoj, kiujn mi antaŭe enkondukis pro ilia oportuneo, sed kiujn mi poste eljetis, por ke ili en la malfacila propaganda tempo ne prezentu superfluan balaston...

II.

El la sama epoko (1881—1882) restas kajereto, kiu kuŝas en la Internacia Muzeo de Vien; mi konsultis ĝin en Aŭgusto 1936. Tio estas ordinara lerneja kajero, enhavanta ĉirkaŭ 80 paĝojn, el kiuj kelkaj estas detranĉitaj. Jen la enhavo:

1. *La Brandistoj / Dramo / de / Frederico Siller/.*

Tio estas la nunaj »Rabistoj». Estas tradukita nur parto de la I-a Akto, Scenoj 1-a kaj 2-a ĝis »Ne! mi ne volas pensi pri tio» (pĝ. 17. de la Pariza eldono). Tiu traduko okupas 33 paĝojn de la kajero. Jen, kion mi povis kopii, kun mia interpretado: (pĝ. 6-a) (la literoj inter rektaj krampoj estas trastrekitaj en la originalo).

...ma plej kara miko, kvan ma plakalpa plumo faktidzas tiranno pu toMo poté
 ...mia plej kara amiko, kiam mia senkalka plumo fariĝas tirano por vi. Mi povas
 de cen taj brivoj kiuri, ke sciligoj de (tuc)(fuc) fu-ĉi specco deb(ə)s/
 de cent ĉiaj leteroj kompreni, kiel sciligoj de tiu-ĉi specco devas
 blessi tal fradral kordolmo val vidé tol jam verai pro la (blemorol)
 vmoŝi cian fratanj koron; mi kvazau vidas cin jam verai pro la
 vorio, la blenoro".... (la maljuna Moor kase sal vidzol.) Vitto, padro,
 sentaube la abomeninda... (la maljuna Moor kaŝas sian vizaĝon.) Rigardu, padro,
 (vraurien)
 mi legé a vo koj la plej modral - "la blenoro ŝtromoj de larmo;" ah!
 mi loras al vi la plej modran - "la abomeninda riverain de larmoj!" hal!
 no kula, kada ke prenluvo de fu-ĉi vitiema suoz - "no val vidé jam
 ili fluis, falis kiel oluvego de tiu-ĉi kompatama vado" - "mi kvazau vidas jam
 tal maljunal pial nadrol (kabrapal) kabrapalal". Oh! Deo! vo esté fa-ci
 vian maljunan pian patron mortopalan... Ho, Dio! vi estas tia-ĉi
 es pin vo scia? la plej malmadral?
 ankoraŭ vi scias la plej malmultan?
 La maljuna Moor. - Palle, palle!
 ----- plien, plien! (??)

franco. - "kabrapalal kadental ba sal seliol e malbesantal la ciol, i ku
 mortopalan falantan sur sian saĝon" kaj malbesantal la tagon, en kiu
 jel una fio estu biobalata a ro (la) "padro," ne vrol o malkaŝu a
 la-ia unua fojo estis balbutita al li "padro." Ne? fion oni malkaŝis al
 mo e del malmadral, kol. mo scia, to scidduj koj malmadral. La fradro,
 mi, kaj de-la malmulto, kiam - mi scias, vi sciligos nur malmulton. Via frati,
 preje, plenu nu la mezol de sa malgloro; mo pas scie kvol pra
 tute, plenis nun la mezuron de sia malgloro; mi almenaŭ scias fion? super
 fa kol ro fekke tabu hor ra gánci i fo sobré sal. kvos Jur
 tia? kionli fakte atingis? krom sef lia gánci en tio (esperas) si au. Hierau
 minokte ro áidu bej kvardek miloj dukatoj de deŝtoj" - bella poŝokuno,
 meonokte li decidis post kvardek mil dukatoj de áldoj" - bela poŝokuno.
 padro - "dekastage veje ra filinol de riba bankiro fi-ĉi e morte....
 patro - "maldaŝtiginte unua lia filinon de riba bankiro tie-ĉi kaj morte....
 (-f. sakvas 33 paĝoj, ĝia-) Moor. - Nelmo ne volé pinti pri fol Mo debé prezai
 ----- - Nelmi ne volas pensi pri tio! Mi devas premi
 ma korpo da gorso e ma volo knuri da ledtoj.
 sian korpon per korasto kaj sian volon knuri per ledtoj.

2. *La Krego (A'ndersen).*

Tiu fabelo estas skribita parte krajone. Ĝi estas traduko nur de la dua parto de la fabelo poste titolita »Kolumo» (Andersen, III, pĝ. 6.)

"Mo habu timige madaŝ amentau!" narra la krego "eĉ mianto o na
 "Mi havas timige multajn amentauojn!" rekontis la kolumo "eĉ momenton oni ne
 lassá mol i kvilo. Mo pil está luga kabaliro e a fo cian (ges-
 lasis min en trankvilo. Mi certe estis eleganta kavaliro, kaj al tio cian (smeli-
 t'rkct). Mo sobá (stifelknecht) e penbilo, kvuŝi mo fisán utá. Vo debá fan
 ta). Mi posedis (bototirilon) kaj kombilon, kiujn mi neniam uzis. Vi devis tian
 mol vidi, kvan mo kuŝa bal flankof Fian" mo ubluj na una amentau,
 min vidi, kiam mi kuŝis sur-la flankof Neniam mi forgesos mian unuan amentauon,
 so está garto, fe delka, fe viurcomolla, fe jantal
 ái estis zono, tiel delikata, tiel velurcomolla, tiel ĉarma! sentia

Pinto.

Bella sero jal urbeto
 Lue fio brué
 E il rondo un puettau (e puettau i rondetto)
 Dolče deklamé. [krajone skribita]
 E pri vivo pri nantassa
 Sante ŝo pallá
 E ma blessó ne koprassa
 Plescíe veksá.
 Oh, maj pintoj, oh maj revoj
 Ne mol perigó!
 A la gloro kordo e al devoj (Al jubenta, a ladevo)
 Madža opru mo.
 De ma vivo la plej kara

3. *La Fiaro (A'ndersen).*

Tio estas la fabelo titolita »La Najtingalo» (Andersen I. pĝ. 24.)

Interesa estas la apostrofo post la litero A, per kiu apostrofo Zamenhof montras, ke la akcento estas sur la unua silabo.

4. *Pinto (i Aŭg'sto 1882).*

Tio estas la poemo, poste titolita »Mia Penso», kaj aperinta en la Unua Libro (Dr Esperanto, Langue Internationale pour Français, pĝ. 24.)

Ni publikigas ĝin ĉi sube, paralele kun la traduko en la nuna Esperanto.

Penso.

Unu belan vesperon urbeto
 nenio bruas
 Kaj en la rondo unu knabetino
 Dolče deklamas.
 Kaj pri vivo pri ita
 Sente ŝi parolis,
 Kaj mian vundon ne kovritan
 Sencie incitis.
 Ho miaj pensoj, ho miaj revoj
 Ne min pereigu!
 Al la gloro kaj al la devoj
 Multon oferis mi.
 De mia vivo la plej kara

Pu mo for esté:
Ma junedo bal altaro
Opre forbrulé.

Ignu mo santé il kordo,
vivi mo volé —
Sej dil gavaj mo malporda
Esti koj poté.
Oh! plejhotal ej la sorto
Tropi mol volé,
Nuk e tuj rompó ma forto,
Dum mo es speré!
Hemza.

5. La arha prego del hebroj.

Tio estas la traduko de la fama prego »Auskultu, Izrael...«. La titolo signifas: »la antikva (= arkaja) prego de la hebroj.« La teksto komenciĝas per: »Ottó Izraelo...«

6. La trema kanto de Mozeo.

Verŝajne »la lasta kanto de Mozeo«.

7. La Roma medento e ra familio.

(La Roma medicinisto kaj lia familio.)

La pappo Innocento VIII esta malfale malsalva. Un dio e jam kompa kol
La pappo Innocento VIII-a estis malsana. Unu tapon oni jam lin?

mortaga e volá sciigi pri ra morto... (Estas 14 paĝoj detranĉitaj
mort kaj volis sciigi pri la morto...)

8. La ŝuisto.

Tio estas fabelo de Andersen, poste titolita »La Paŝtisto de porkoj« (II. pĝ. 16-a).

Esta kan princo, kvu habá kol tre malmagna civetto, seĝ i kva kaĝo: fu-bi
Estis iam princo, kiu havis nur tre malgrandan regneton, sed en ĉia okazo tiu-ĉi

está et satte magna, por margidi i ro, e margidi ro prestre degá. Está
estis aŭfide granda, por adriĝi en li, kaj adriĝi li deziris. Estis

pil kom krasé de sa kofto, ŝu ro garru a so palli al filak del
certe ion arope de la flanko, ke ŝi venis al si diri al-be filino de-la

imperestro: "volé fo mol?" Seĝ ro tura (turu?) fol faktá kor ra nomo esta
imperiestro: "ĉu volas eá mine?" Sed ŝi reĝis tion fari, ĉar lia nomo estis

ĉi glura. Esta cenoj grando, kvu ko lito aprenis ra ĥanno. Seĝ vidó
ĉi glura. Esta cenoj grando, kvu ko lito aprenis ra ĥanno. Seĝ vidó

no, bi so fol faktá. En odó mol Bal tombo del patro del princo: kreska
ĉi. Ŝi ŝi tian fari. Jen, aŭdu ĉi Sur-ĉa tombo de-la patro de-la princo kreska

rudio, fakke karma rudio! Koj un fio i kvin annoj ro flori e helassa
rudio, fakke karma rudio! Nur unu fojon en kvin jaroj li floris kaj donis

fan a fo koj un sola rudio, seĝ fu-bi romá fe ĥarnige, su o roi fia-
tiam al tio nur unu solan rozon, sed tiu-ĉi arope tial ĉar ĝi, ke oni lin sen-

dente ubi ĉiuj eĝ sutoj e malrado. Ro es habá fiaro,
tante forzesis ĉiujn siajn sorgejn kaj malgelojn? Li ankaŭ havis naŝtingalon.

kvu fe bone scis kanti vel ĉiuj janta melodoj lora i ra malmagna
kvu tiel bone scis kanti, kvaraz ĉiuj ĉarna melodoj, loĝis en lia malgranda

laringetto. Ful-bi rudro e ful-bi fiaro debá kini la princaŭ. Fej
laringetto. Tiu-ĉi rozon kaj tiu-ĉi naŝtingalon devis ricevi la princaŭ, tial

po baj estu (sio) motasaj i magnaj ardaj irioj e formittasaj
ili ankaŭ estis metitaj en grandajn arĝentajn kestojn, kaj forsenditaj

al princaŭ. La imperestro lassu pol porti il magna zalo, e kvu
al-la princaŭ. La imperestro lassu ilin porti en-la grandan salanon, en kiu

alĝu la princaŭ pu (ludi) bavi ko saĝ kobanaŭ. Pli po ne haba pu fakti
iris la princaŭ por ludi kun siaj korteganinoj. Pli ili ne havis por fari.

Kvan ko vidu la magnaj irioj kol ĥenroj ko de leto eklaku dai
Kiam ŝi vidis la grandajn kestojn kun-la doncoj, ŝi de foĝo ekplaudis per-la

mano. At fo estas feletto! Paliu ko; seĝ estu vidita la karma rudro.
mano. "Se-nur tio estus katetoj!" diris ŝi; sed estis vidita la ĉarna rozo.

"Ah, kvu-jante ro está faktassa!" paliu ĉiuj kobanaŭs..... "Nu, kvoll ro
"Ĥaj, kieĝ ĉarna li estas faritaj!" diris ĉiuj korteganinoj..... "Nu, kion li

oallo?" mandu la princaŭ. "Pol mo pur ne poté palli!" pondu la ko-
diris?" demandis la princaŭ. "Tio mi (vere) ne povas diri!" respondis la ko-

ĥanab; "fo está strapa!" - Nu, fe to poté fol ĥeppi a mo il uro!
teganino; "tio estas terura!" - Nu, tiel vi novas tion flustrá al si en-la ore-

S ko ĥeppu fol e ĥo il uro. Ro et esté plesaga! Paliu la
lon! "Kaj ŝi flustris tion al si en-la orelon." Li estas senseĝal!" diris la

princaŭ e belle foralla. Seĝ ĥab ko alĝu malmagna denco e la
princaŭ, kaj rapide foriris. Sed apenau ŝi iris malgrandan distancon, kaj la

tintiloj ekludu fe janta. "Oh prekara mia Augusto! For esté ĉio!" "Ottó,"
tintiloj ekludis tiel ĉarme: "Ho, tre-kara mia Augusto! For estas ĉio!" "Ĥusku-

ree kojpu la princaŭ mandó rol, ŝi ro volé dek kussoj de maj kob-
tui" ree komencis la princaŭo demandu lin, ĉu li volas dek kussoj de miaj korte-

Por mi for estas:
Mia juneco sur-la altaro
Ofere forbrulas.

Fajron mi sentas en-la koro,
Vivi mi volas,
Sed ĉe la gavaj (?) mi mal-
Esti nur povas.
Ho! Plejalta! Se la sorto
Trompi min volas,
Nun kaj tuj rompu mian forton,
Dum mi ankoraŭ esperas!

nabŝ." "Oh, ne!" paliu la ŝuisto. "ĉek kussoj del princaŭ, su mo ĉiuj
kaninoj." "Ho, ne!" diris la porkisto, "ĉek kussoj de-la princaŭ, su mi konse-

la tupe!" - "Kva tergiga rio" ekriis la princaŭ, seĝ fe vo debé paŝ
la poton!" "Kia ĉarrena afero" ekriis la princaŭ, sed tiel vi devas almenaŭ

riatavidi, dum fiu fol poté vidi!
antaŭ-stariĝi, por-ke nenba tion covu vidi!"

9. Mirkoj hel getto. (De Leopoldo Komperto).

Longa artikolo, kies titolo signifas verŝajne »Mirakloj el la ghetto«, kaj kiu entenas naŭ ĉapitrojn:

.I. La hevoskasa.
.I. La

Il - nokto la mortagaj leŝi he saĝ tomboj e alle il sengó pu fi
En-la nokto la mortintoj levigas al siaj tomboj, kaj iras en-la sinagogen por tio

origi. Fo herrené la tabroviskoj hel sankta ĵarko, malviske pol e kolpe
origi. Ili elprenas la volvojn el-la sankta ĵarko, malvolvas ilin kaj komencas

legi he fi la sedro del simo. Fo está moa predenta kelidho, es bu po
legi el tie la de-la senaĝno. Tio estas inter ili

ne está odita eĝ la pli malmagna fuko.....
ne estas aŭdita eĝ la plej malgranda

.II. La fano, kvu ne kinu beno
La infano, kiu ne ricevis benon.

.III. La sol movantaj libroj.
La sin movantaj libroj.

.IV. Kvu fo esté pondi "amen".
Kio tio estas respondi "amen" (?)

.V. La mortagaj il sokka vagojo.
La mortinto en-la saka vagojo (??)

.VI. La fano, kvu vidu Mesuho.
La infano, kiu vidis Mesion.

.VII. La testoj del avo.
La atestoj de-la avo.

"Fibeletta, ma kara," paliu un fio linda okdekkinanna maljunoro a sa nepo.
"eto, ma kara," diris unu fojon okdekkinjara maljunulo al sia nepo.

otto matire, kvol no nuk a to paliu. Il nokto to, pro Deo, ne fajfó la
suskulta kion mi nun al vi diros. En-la nokto si, pro Dio, ne fajfó la

estono poté fol odi, e ro kurbigu a to la buŝo...
estano covas tion aŭdi, kaj li kurbigis al ĉi la buŝon...

.VIII. La beno de Deo.
La beno de Dio.

.IX. Ne poti morti.
Ke poti morti. (Pallassa-faktassa!
dirite-farite).

En »Literatura Mondo« (Julio 1932), Baghy, liveras alian pecon de la teksto citita de Z. en la ĉi-supra artikolo (li cetere aludas la formon rajiŝé):

10. La Umbo.

La Ombro.

LA UMBO.
LA OMBRO.

Il kalaj guroj la ĥemo rajiŝé alia pretalo el di no. La homo faktidhó
En-la varmaj landoj la suno radias alian varmecon ol ĉe ni. La homo farigas

tute buraj, e il plej kalaj buraj po eĝ ĉiel bruligado del ĥemo faktid-
tute brunoj, kaj en-la plej varmaj landoj ili eĝ la bruligado de-la suno fari-

ĥe negroj....
ĝas negroj....

En la sama artikolo, Baghy liveras novan kopion de la poemo jam publikigita de Privat (Vivo de Z., pĝ. 29.) kaj komentita de Penndorf (Lingva Kritiko, n-ro 16.), sed kun kelkaj eraroj, venantaj el leg-eraroj de Privat, kaj kelkaj mankoj.

[redžiĉaŭ]

Mo bella princino il sonto vidà
 Ko žuoj malseŝaj e palaj
 Sul dillo, sul verda no koe sidà
 Il armoj amizaj e kalaj.

»La kron' de ta padro fio pu mo esté,
 La ora. la redža ra sello!
 La skepro diantiza, rol mo ne volé,
 Tol mem koj volé mo, ma bella!

Fo et ne estebla, ŝo pallu a mo,
 Kor et i la tombo kuŝe mo
 E koj i la nokto vioné mo a to,
 Kor tol fe precale amé mo!»

Fine Baghy liveras ankaŭ la titolon de jena verko:
 12.

Lingvo Universala f.e.gramatiko e verboj laŭ trana ridakto. del anno 1881.
 Lingvo Universala t.e.gramatiko kaj vortaro laŭ la lasta redakto de la jaro 1881.

Verbaro. (Kajpasta i Augusto del anno 1881).
 Verbaro (Kajpasta i Augusto del anno 1881).

kaj de unu alia:

13.

1881. Verbaro Russa-Universala.
 1881. Verbaro Russa-Universala.

La ĉi-supraj tekstoj liveras sufiĉan materialon por studi unu el la formoj, kiujn alprenis la »Universala Lingvo« de Zamenhof, antaŭ la publikigo de Esperanto en 1887. Ĉiuj tiuj tekstoj efektive datas de 1881—1882, kaj prezentas sufiĉe koheran lingvaĵon. Kompreneble, ni ĉeestas kelkajn provojn kaj novaĵojn: ekz-e la akuzativo, kiu ekzistas nur ĉe la pronomoj, estas etendita al la substantivoj en la fragmento 1.; la sufikso -ar- havas la formon *oz* en la fragmento 13., kaj -i- en la fragmento 12. ktp. Tamen, oni povas jam paroli pri memstara formo de la lingvo.

Ni studos ĝin pli detale ĉi-poste; tamen ni jam povas rimarki kelkajn rimarkojn:

a) la akuzativo ŝajnis al Z. neutila en la substantivoj kaj adjektivoj.

b) dum la formoj de la pronomoj kaj eĉ de la tabelvortoj estas jam sistemigitaj, la formoj de la verboj restas strange ĥaosaj.

c) krom en la peco 11., ekzistas stranga misakordo inter la pluralo de la viraj substantivoj (per -j), kaj tiu de la virinaj (per -s). Tio devenis de la neoblo aldoni -j al la finaĵo -aŭ, kiu markis la virinan rekson; cetere la finaĵo -s por la pluralo estas restaĵo de la unua formo de la lingvo (Pra-Esperanto I).

III.

SKIZO DE LA GRAMATIKO DE PRA-ESPERANTO II-a.

1. Artikolo nedifinita ne ekzistas. Difinita estas la, nevaria. Sed post prepozicio la artikolo algluiĝas (*sub*).

2. Substantivoj finiĝas per -o, krom la in-seksaj nomoj, kiuj finiĝas per -aŭ. La pluralo estas markita per postmetita -j, krom por la in-seksaj nomoj, kiuj formas sian pluralon per -s: *amento* (amanto), *amentoj* (amantoj); *amentaŭ* (amantino) *amentaŭs* (amantinoj).

Substantivoj ne havas kazojn (krom en la peco nr-o I-a, kaj eĉ tie nur parte).

3. Adjektivoj finiĝas per -a. Pluralo ĉiam per -j. Komparativo per *pli*, superlativo per *plej*.

4. Numeraloj, kiel en Esperanto I-a (krom *un*

[reĝidino]

Mi belan princinon en-la sonĝo vidis
 Kun vangoj malsekaj kaj palaj,
 Sub la tilio, sub la verda ni kune sidis
 En la brakoj amozaj kaj varmaj.

»La kron' de ĉia patro nenio por mi estas,
 La ora, la reĝa lia seĝo!
 La sceptron diamantozan, ĝin mi ne volas,
 Ĉin mem nur volas mi, mia bela!

Tio ne est-ebla, ŝi diris al mi,
 Ĉar en la tombo kuŝas mi
 Kaj nur en la nokto venas mi al ĉi,
 Ĉar ĉin tiel varmege amas mi!»

(= unu) kaj *cen* (= cent). Sed oni rimarku »*mi*loj dukatoj, *cen*oj princaŭ« (mil dukatoj, cent princinoj).

5. Personoj pronomoj: *mo*, *to*, *ro* (samtempe »*li*« kaj »*ŝi*«), *ŝo*, *no*, *vo*, *po* (= ili), *so* (= si), *o* (= oni). Ili havas do la saman finaĵon, kiel substantivoj, sed krome, ili havas kazon akuzativan per -l: *mol*, *tol*, *rol*, *ŝol*, *ŝol*, *vol*, *pol*, *sol* (= min, ĉin, lin ktp.). Posedaj adjektivoj formataj per ŝanĝo de -o en -a: *ma*, *ta*, *ra*, *ŝa*, *na*, *va*, *pa*, *sa* (= mia, ĉia ktp.).

6. Verbo: prezenco -*é*, imperfekto -*á*, aristo -*u* (verŝajne ne akcentita!), futuro -*uj*, kondicionalo -*ás*, imperativo -*ó*, infinitivo -*i*; el tiuj formoj, kvar ŝajnas akcentitaj sur la lasta silabo (*mó*, *ublé*, *ablá*, *ablás*, *ubló* — mi forgesas, forgesis, forgesus, forgesos), kaj la aliaj sur la antaŭlasta. Sed estas iom malfacile juĝi, ĉar kelkfoje Z. forgesis marki la supersignon. Tamen, en la peco 11-a, v. 9-a, la ritmo pruvas, ke la imperfekto ne estis akcentita sur la lasta silabo.

Participoj: aktivo prezenca -*enta*; preterita -*aga*. pasivo prezenca? ; preterita -*assa* (sed oni trovas ankaŭ unu fojon la finaĵon -*ita* (peco 9-a)). Ŝajne ne ekzistis futuraj participoj.

7. Adverboj per -*e*.

8. Prepozicioj ŝajne ĉiuj unusilabaj kaj finiĝantaj per vokalo:

i (en), *ba* (sur), *bi* (post), *bu* (inter), *blo* (kontraŭ), *he* (el), *da* (per), *di* (ĉe),

de (de), *pu* (por), *su* (sub), *ŝte* (?), *ja* (?), *pra* (super), *pro* (pro), *pri* (pri) *ko* (kun).

(Multaj aprioriaj formoj, el kiuj kelkaj restin en E.)

9. Konjunkcioj: *at* (utinam); *sej* (sed), *ĉi* (ĉu), *ŝu* (ke), *dam* (por ke), *kor* (ĉar), *vel* (kvazaŭ), *el* (ol)

Primitivaj adverboj: *os* (ankaŭ), *es* (? ankoraŭ), *for* (for), *eĉ* (eĉ), *koj* (nur), *nu* (nu), *nuk* (num), *eŝ* (?), *si* (jes), *e* (kaj), *en* (jen), *kaŭ* (apenaŭ), *paŝ* (almenaŭ), *jur* (hieraaŭ), *pil* (certe), *pin* (?).

Prefiksoj *pre* (= -og-), *ple-* (= sen-).

10. Tabelvortoj:

	-o	-a	-u	-e	-al	-el	-an	-on
mi	fo	fu	fa	fi	fo	fa	fan	kon
ki	kvo	kvu	kva			kve	kvan	
ĉi	ĉio	ĉiu		ĉil			ĉian	
mi	fio	fiu					finan	

Tamen, en la peco I-a, oni renkontas la rilatajn formojn: *ku*, *ko*, *ke*, *kan* (anst. *kvu* kp.) kaj la formojn *kvo*, *kva* ŝajnas signifi »ĉio, ĉia«, sed la senco ne estas klara. Rimarkinde estas la konfuzoj inter *fio* (= nenio) kaj *fio* (= fojo), inter la nedifinitaj formoj kaj la provitaj formoj de la rilatpronomoj ktp. Se la serio de la nedifinitaj pronomoj estis regula, oni havis ankaŭ *ko* (= kio) kaj *ko* (= kun) ktp. Pri tiuj karambuloj aludas verŝajne la *Letero* al Borovko.

Kara Kolego.

Mi ĵus legis en Lingvo Libro vian respondon al mia lasta letero.

Vi ne konsentas pri mia difino de kunmetita vorto (K. V.) = mallongigo de esprimo, kiu, laŭ via opinio, estas tiel vasta, ke ĝi ne estas valida; kaj kiel pruvon vi citas: *divershomoj, malrapidlerni* ktp.

En la pĝ. 21 malsupre estas respondo al via kritiko; mi diras: *Estas anstataŭinda de K. V. ĉiu esprimo, kies komprenebleco ne estas ĝenata per forigo de kelkaj vortoj.*

Tiun kondiĉon evidente ne kontentigas la esprimoj, kiujn vi citas; ĝi montras, ke multaj aliaj ankaŭ ne povas naski K. V.-ojn.

Via principo de vortefiko, kies aplikado ŝanĝas la gramatikan naturon de la vortoj entenataj en la K. V., kontraŭas la tre simplajn regulojn donitajn en la Fundamento pri la K. V.-oj: »kreataj per simpla kunligado de vortoj«. Tiu kunligado do ne ŝanĝas tiujn vortojn.

En la vorto *kantaro* la vorto *kanti* ne fariĝas *kanto* pro *aro*; *kanto* estas kreita tute sendepende de *aro*; kaj la K. V. rezultas el la kunligado de *kanto* kaj *aro* tute same, kiel *arbaro* rezultas el la kunligado de *arbo* kaj *aro*. La verbo *kanti* eniras en *kantaro*, entenata en *kanto* = por *kanti* aĵo = kantata aĵo.

Mi opinias, ke estas danĝere starigi regulojn fonditajn sur uzo, kiu daŭris nur 50 jarojn, estis efektivigata de relative malmultaj homoj, ne atingis ĉiujn landojn kaj estis nek kontrolita de kompetentuloj, nek sankciita de Akademio. Oficialigante tiujn rezultatojn, oni riskas enkonduki maltaŭgajojn, kiujn poste oni devos forigi.

Bedaŭrinde, tio okazis pri DE, kiu, kiel vi konsentas, havas teorion nur unu signifon (deveno, kaŭzo), kaj kiun oni uzas laŭ multaj aliaj, eble pro simileco al la naciaj lingvoj.

Ekzemple post agsubstantivo DE laŭ sia funda signifo montras la aganton kaj la agaton, kaj el tio povas rezulti konfuzo; sed ĝi estas forigebla, se oni uzas por la agato akuzativon, kiel kelkfoje faris Zamenhof, aŭ se oni aldonas pasivan partupon antaŭ la aganto. Uzo de tiu pasiva partipo evitas praktike ĉian dubon, kaj oni povas doni la regulon: *forigi ĝin nur tiam, kiam la signifo evidente rezultas el la kunteksto.*

(En via ekzemplo: »la ĉevalo estas aĉetita de Petro« DE havas la saman signifon, se Petro aĉetis la ĉevalon (tiam DE montras la devenon de la ago), aŭ se oni aĉetis ĝin de Petro (ĉar tiam DE montras la devenon de la ĉevalo). La konfuzo devenas de la esprimo kaj ne de la multsignifo de DE, ĝi estas facile forigebla, se oni uzas *el* Petro en la dua okazo.)

La supre proponita regulo estas apliko de la funda principo pri la *minimama peno*, kiu donas al Esp-o ĝian nekompareblan superecon. Jen per tiu regulo la klarigo de la 11 ŝajnaj signifoj de DE laŭ la Plena Vortaro; inter krampoj estas la subkomprenataj participoj.

- 1) foriri de ia loko (deveno)
- 2) de du jaroj (komenco)
- 3) tremi de febro (kaŭzo)
- 4) amata de ĉiuj (kaŭzo)
- 5) de kiu estas (posedata, verkita) tiu libro
- 6) la libro (posedata, verkita) de Petro
- 7) ĉevalo (karakterizata) de blanka koloro
- 8) peco (apartigita) de kuko
- 9) konkero de Anglujo (farata) de la normanoj
- 10) mortigo (ricevata aŭ farata) de homo
- 11) sukceso (atingita) de entrepreno.

Evidente, uzo de tia participo ne estas praktika; sed ĝi estas tre malofte necesa. Ĉiukaze, oni ne devus konsenti pri la multsignifo de DE en teoriaj diskutoj.

Tutkore via:
Rollet de l'Isle

Estimata Kolego!

Pardonu, ke mi respondos iom tro longe vian diskut-artikolon pri la vortfarado. Mi faras tion pro tio, ke laŭ mia opinio, la fiksado de la vortkunmetaj reguloj estas tre grava por la lingvo, kaj estus tre bone, se la Akademio povus konsenti pri sistemo, kiun ĝi oficialigus.

Unue, mi parolos pri viaj kontraŭdiroj:

1) Via regulo: »Estas anstataŭinda de K. V. ĉiu esprimo, kies komprenebleco ne estas ĝenata per forigo de kelkaj vortoj« evidente ne malpermesas la kunmetojn *divershomoj, malrapidlerni*, ktp.: tiuj kunmetoj ja estas kompreneblaj. Mi ne komprenas, kial vi diras, ke ili ne kontentigas la kondiĉon postulatan de via regulo. Tamen, ili ne estas uzataj.

2) Mia principo de vortefiko tute ne kontraŭas la Fundamentan regulon: »K. V. estas kreata per simpla kunligado de vortoj«. Vi intermiksas radikon kun vorto. *Varm-radio* estas *varmo-radio*, *kantaro* estas *kanto-aro*. Estas tute indiferente, ke *varm* estas adjektiva, kaj *kant* estas verba *radiko*: ĉi tie temas nur pri substantivaj vortoj, t. e. pri *varmo* kaj *kanto*. Kiel oni povas senmalhelpe krei la memstarajn vortojn *varmo* kaj *kanto*, tiel same oni povas krei la substantivajn flankelementojn (laŭ vi, determinantojn) *varmo-* kaj *kanto-*. Kaj la kunmeto okazas per la »simpla kunligado« de tiuj ĉi substantivaj vortoj, devenintaj el nesubstantivaj *radikoj*.

La demando estas nun, kiel do ni scias, ke en la supraj kunmetoj oni derivis el alikarakteraj radikoj substantivajn vortojn, antaŭ ol ilin kunligi. Nu, laŭ mia regulo, tiel ke tiuj radikoj staras antaŭ *substantiva* ĉefelemento (determinato), kaj tiaokaze ĉiam, senescepte okazas tiu substantivigo. Mi ripetas: ne temas pri tio, ke verba aŭ adjektiva radiko perdas kiel radiko sian karakteron, sed simple pri tio, ke ĝi fariĝas substantiva vorto, per alkröco de la o-finaĵo videbla (ekz-e en *dormo-ĉambro*) aŭ latentaj (ekz-e en *kant(o)-aro*).

Oni do ne povas diri, ke mia regulo »ŝanĝas la gramatikan naturon de la vortoj entenataj en la kunmetita vorto«. En Esp-o nur la *radikoj* havas fiksitajn gramatikan naturon; la gramatika naturo de la *vortoj*, male, dependas sole de la alkröcota finaĵo. Kaj same kiel ni povas ŝanĝi la finaĵojn en simplaj vortoj, ili estas ŝanĝeblaj ankaŭ en la elementoj de la vortoj kunmetitaj.

En la Pl. Gr. tre vaste mi eksplikis mian sistemon, kaj krome mi vaste komentaris ĝin sur la paĝoj de L. L., respondante al diversaj kritikoj. Nun mi volus ĝin resumi ĉi tie en la formo de lakonaj reguloj, sen ia motivo. Mi kredas, ke per tio ili fariĝos multe pli kompreneblaj kaj trarigardeblaj.

Reguloj de vortkunmeto.

I. La ĉefa vorto (ĉefelemento) staras en la fino. La antaŭa elemento, kiu la ĉefelementon determinas, estas la flankelemento.

II. Ĉefelemento povas esti ankaŭ finaĵo (Fund.: la finaĵoj povas esti rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj). Laŭ tio oni povas distingi vortojn duelementajn, en kiuj la finaĵo rilatas sole al la dua elemento (kon-varmo:

varmo de koro) kaj trielementajn, en kiuj la finaĵo estas memstara, do formas apartan elementon krom la du antaŭaj (ĉirkaŭurba: ĉirkaŭ-urbo-a: [estant] a ĉirkaŭ urbo).

III. En duelementaj vortoj la gramatika vortkaraktero de la flankelemento dependas de la gramatika vortkaraktero de la ĉefelemento. ATENTU! Ne de ties radikarkaraktero!

1) substantiva ĉefelemento substantivigas sian flankelementon: *dormĉambro* = dormo-ĉambro, *pregaro* = preĝo-aro, *varmradio* = varmo-radio. La analizo okazas per DE, aŭ per pli preciza prepozicio anstataŭigbla per DE: ĉambro de (por) dormo; aro de preĝoj; energio de varmo; aŭ per EL: *orĉeno* = ĉeno el oro; aŭ per simpla apudmeto; *kverkarbo* = kverko arbo; *soldatkamarado* = soldato kamarado.

2) adjektiva ĉefelemento substantivigas sian flankelementon. La analizo okazas per JE, aŭ per pli preciza prepozicio anstataŭigbla per JE: *posedavida* = posedo-avida = avida je posedo; *sangavida* = avida je sango; *belriĉa* = belo-riĉa = riĉa je belo.

3) verba ĉefelemento povas igi sian flankelementon

a) adverbo: *pafmurdi* = pafe murdi = murdi per pafilo; *martelbati* = martele bati = bati per martelo; *kunlabori* = kune labori. RIM. Oni laŭeble evitu tiajn vortkunmetojn kun adjektivradika flankelemento, ĉar tiaokaze pli natura estas la analiza formo: diligente lerni, rapide paroli, bone farti. Se ne temas pri prepozicia aŭ prefiksoida flankelemento (ekiri, kunludi), oni uzu tiajn kunmetojn nur, se ili estas analizeblaj ankaŭ per PER: murdi per pafilo, per martelo.

b) predikatan adjektivon: *purigi* = igi (ion) pura; *dismeti* = meti (ion) disa; *kunrasti* = rasti (ion) kuna.

IV. En trielementaj vortoj, ĉe memstara finaĵo, ekzistas du ĉefaj eblaĵoj:

1) la duobla flankelemento povas ekzisti ankaŭ memstare, laŭ la reguloj priskribitaj sub III. Tiam ni parolas pri kuntenaj flankelementoj: *domkonstrua* = domkonstruo-a: domkonstruo-rilata; *domkonstrui* = domkonstruo-e-i = (ag)i domkonstrue. Kiel ni vidas, inter la ĉefelemento kaj la duobla flankelemento validas la reguloj priskribitaj sub III. t. e. *rilata* (adjektivo) postulas antaŭan substantivon (domkonstruo); *i* (verbo) postulas antaŭan adverbon (domkonstrue).

2) la duobla flankelemento ne povas ekzisti memstare laŭ la reguloj priskribitaj sub III. (disfalaĵo flankelementoj). Tiaokaze ekzistas ree du eblaĵoj:

a) ili povas sintakse interrilati laŭ sia gramatika karaktero konforma al la radikarkaraktero: tiam ĉe la analizo ni simple kroĉas al ili la pleonasman finaĵon: *samklasa* = sama-klaso-a = sama-klaso-apartena = apartena al sama klaso; *grandanima* = granda-animo-a = granda-animo-karakterizata — karakterizata de granda animo.

b) ili ne povas sintakse interrilati laŭ sia gramatika karaktero radika. Tiaokaze ĉiam la maldekstra flankelemento konservas sian radikarkarakteron kaj influas per tio la dekstran (inversa vortefiko). Tiu maldekstra elementa estas aŭ prepozicio aŭ adjektivo. Ambaŭ rilatas ĉiam al substantivo, do ili substantivigas la dekstran elementon: *senforta* = sen-forto-a = (estant)a sen forto; *helverda* = hela-verdo-a = hela-verdo-karakterizata = karakterizata de hela verdo.

RIM. Same kiel la memstara finaĵo kondutas ankaŭ radika aŭ sufiksa ĉefelemento havanta duoblajn aŭ trioblajn flankelementojn:

1) kuntema flankelemento: *domkonstruisto* = isto de domkonstruo.

2) disfala flankelemento: *samidĉano*: sama-ideo-ano = ano de sama ideo.

3) triobla flankelemento: *enpoŝigi* = igi enpoŝa = igi en-poŝo-a = igi (estant)a en poŝo.

RIM. II. Ke temas pri tia memstara finaĵo, tion montras, ke analizante la vorton laŭ punkto III., ni ne ricevas senĉavan rezulton. Ekz-e *domkonstrua* analizigis *konstrua je domo*; *samklasa* — *klasa je sama*; *senforta* — *forta je seno*. Tio evidentiĝas, ke oni devas memstarigi la finaĵon. Tion farinte ni ricevas: *domkonstruo-a*, *samklaso-a*, *sen-forto-a*, do la sencojn, laŭ kiuj ĉi tiu vortoj estas efektive uzataj.

V. Kelkaj vortoj (junedzo, dikfingro, sovaĝbesto) ne obeas la suprajn regulojn. Tiuj do estas neregulaj kunmetoj, aparte lernotaj; ili tute ne estas modeloj, laŭ kies ekzemplo oni povus fari vortojn. La vorto *dikfingro*, ekz-e, ne pravigas la vorton *dikagento* (dika agento).

VI. Ne obeas la suprajn regulojn la veraj prefiksoj (bo, eks, ge, mal) kaj la veraj sufiksoj (et, eg, aĉ, um). Ĉe ili ne temas plu pri *kunmeto*, sed pri *derivo*. La samo rilatas ankaŭ pri tiuj esceptaj kunmetoj, pri kiuj ni parolis supre (punkto V.)

Jen estas la sistemo en plej mallonga redakto. Mi ne kredas, ke ĝi estus ŝanceblila. Kaj mi ne kredas, ke ĝi estus malpli facila ol via sistemo, kiu, krome, mi ripetas, estas tiel malstrikta, ke ĝi donas nenian orientiĝon en specialaj kazoj.

*

Nun ni parolu pri la problemo de DE.

Unue, mi retiras tiun mian koncedon, ke teorie DE estas unusignifa. Efektive, nenian komunan signifon oni povas trovi inter la posedo kaj la origino de io. En *libro de Goethe* (verkita de G.) kaj *libro de Petro* (posedata de P.) DE havas sencan tute diferencon, neniel redukteblan al komuna bazo.

Sed eĉ se ekzistus teoria unusignifeco, en lingvo ja nenion ĝi valoras, kiam praktike la signifoj estas tiel diversaj, ke povas rezulti miskompreno. Vi mem ja serĉas rimedojn por tion elimini.

Jen ekzemple: *aĉeto de sklavo*. Tio signifas 1) ke sklavo aĉetas, 2) ke oni aĉetas sklavon, 3) ke oni aĉetas de sklavo.

Vi diras, ke en: *la ĉevalo estis aĉetita de Petro*. DE montras jen la devenon de la ago, jen la devenon de la ĉevalo. Nu, ĝuste tio estas malbona, ke ĝi povas montri jen tion, jen ĉi tion, do du aferojn rekte kontraŭajn: en la unua okazo Petro akiras, en la dua Petro fordonas la ĉevalon. El ĉi tio, laŭ ĝusta konsidero, oni povas konkludi nur, ke la teoria unuigo de tiuj du sencoj estis erara, ĉar la praktiko montras, ke ĝi ne taŭgas.

Certe, plej bone estus, se Esp-o havus tri prepoziciojn anstataŭ DE: unu por la posedo rilato, alian por la ago rilato, trian por la deira senco (tempa kaj spaca). Oni povus proponi ekz-e: DE, PAR kaj AB. Sed tia propono estus tute senŝanca, ĉar Esperanto nun jam ne toleras ŝanĝon de fundamentaj elementoj.

La solvo povas esti nur tio, ke DE havas resuman signifon por ĉiuj tri supraj sencoj. Sed, en okazo de neceso, kaj nur tiam, oni ĝin pliprecizigas, por eviti konfuzon.

Plej facila estas tiu pliprecizigo por la deira senco: ĉe ĝi eĉ pli facile estas distingi inter la tempa kaj la spaca rilato, ol trovi esprimilon por ili ambaŭ kune. Ni havas ja du sufiksojn, el kiuj unu signas tempkomencan (EK), la alia malproksimigon de centro (DIS). Oni do povas fari tute regule la du prepoziciojn EKDE kaj DISDE.

REVUO DE REVUOJ

LA INTERNA IDEO estas vigle redaktita gazeto de la nov-zelanda esp-istaro. En ĝi mi legis la sekvan rakonton, verkitan de la juda poeto Jakob Glane, tradukitan de Jesaja Gordon. Ĝi titoliĝas: La filozofoj kaj la kamparano. »Maljuna klerulo, filozofoj, foje bezonis transiri riveron. Li dungis kamparanon kun velsipo. La tago estis bela, la ĉielo klara kaj la rivero blua. Nu, ĉu la filozofoj havis timon? Tute ne! Veturas do la filozofoj kaj la kamparano sur la ŝipeto. Kaj la ŝipeto glitas kviete: plezurego. La filozofoj rigardis la ĉielon kaj la kamparano — la akvon. Diris la filozofoj al la kamparano: »La filozofion, ĉu vi ĝin konas?« La kamparano ne sciis, kio estas tiu kaj li respondis kiel kutime: »Ne«. »Se vi ne konas la filozofion, kamparano«, diris la filozofoj, »vi perdis la duonon de via vivo.« »Domage!« »Kaj ĉu ankaŭ la matematikon vi ne konas?« »Ne.« — respondis honte la kamparano. »Ho, ho!« — diris la filozofoj, »kaj verŝajne ankaŭ la historion vi ne konas, ĉu? Frateto, tri kvaronojn de via vivo vi malŝparis!« Dume la ĉielo kovriĝis per nuboj kaj la suno kaŝiĝis kaj la tago pli kaj pli mallumiĝis. Forta vento ekblovigis el tiu flanko, kie la suno subiras. La ŝipeto saltis de ondo al ondo. Jen, renversis ĝin la vento. La filozofoj tenis la veston de la kamparano murmurante preĝon. »Naĝon, ĉu vi konas?« — demandis naive la kamparano al la filozofoj. »Ne« — respondis la timigita klerulo. »Do vi perdis la tutan vivon, sinjoro filozofoj!« — respondis trankvile la kamparano. »... Nun mi rimarkas, ke dum kopiado mia skribmaŝino kapricis kaj la rakonton ĝi ne tute tiel surpaperigis, kiel ĝi aperis en la nov-zelanda gazeto. Sed mi esperas, ke la tradukinto pardonos la kelkajn ŝanĝetojn, kiujn kaŭzis la kapricado de mia maŝino.

Se mi jam estas sur la Pacifika Oceano, ni faru nur salteton kaj vizitu Aŭstralion. »Sukro« daŭrigas sian vivon vere originalan en Esp-ujo. Nu, oni vere ne povus kontesti la vigelecon kaj oftan spritecon de ĝia redaktoro. Nepre ne enue estas aŭskulti lian opinionon pri Esp-aj kaj eksteresp-aj aferoj de l' nuntempo. Sed liaj tri prepozicioj (DI, DE, DA) kaj lia JE anstataŭ akuzativo nenium elementoj ĝis nun, kaj certe nenium delogos. La fundamentaj elementoj de Esperanto nun jam ne estas ŝanĝeblaj. Alia afero estas la precizigo de DE en okazo de neceso (EKDE, DISDE, FARE DE), ĉar ĝi allasas la uzon de simpla DE, kiam la kunteksto sendubigas la sencon. Krome, S-ro J. di K. ofte riproĉas la Plenan Gramatikon. Nu, estus tamen tre bone, se li iom studus el ĝi la spiriton de la lingvo, ĉar liaj frazoj ofte apenaŭ estas deĉifreblaj.

En la oktobra numero de VERDA REVUO ni trovas belektan soneton de Karl Jimel. Mi publikigas ĝin ĉi tie, kiel, bedaŭrinde, adiaŭon al tiu gazeto:

Por la aliaj okazoj, la afero estas pli komplikita. Ni rigardu.

DE inter du substantivoj povas signi jen la posedon, jen la originon. Ĉi lastan, se povas ekzisti dubo, oni devas do aparte signi: libro de mia amiko (posedo); libro verkita de mia amiko (origino).

Post agsubstantivo DE povas enkonduki jen la aganton, jen la priagaton. Se povas ekzisti konfuzo, la unuan oni signu ĉiam per FARE DE, kaj tiam DE estos senduba montrilo de la priagato. Oni do povas diri *skribo de infano*, ĉar infano ne povas esti skribata, sed oni diru *priskribo fare de infano*, ĉar priskribi oni povas infanon, kaj la simpla *priskribo de* signifas unuavice ĉi lastan.

Post pasiva partecipo DE ĉiam enkondukas la aganton. La ablativon do oni devas signi ĉiam per DISDE: *oni aĉetis la ĉevalon de Petro* — *la ĉevalo estis aĉetita disde Petro*.

Jen, mi kredas, perfekta sistemo, havanta la avantaĝon, ke ĝi ebligas ĉiam precizan komprenon, kaj tamen

Aŭtuno.

Aŭtuna vent' flirtigas la foliojn
de arbobranĉoj en la kort'.
Tra bruna foliar' sen fort'
aŭtuna suno sendas la radiojn.

Susuras la folioj elegiojn
dum ili falas, pri la sort',
kaj tra la pintoj en agord'
sonigas vent' malgajajn melodiojn.

La suno malaperas okcidente.
Malvarmaj estas noktoj de l' aŭtun';
Jen bird' sur kalva branĉ' ekpepas plende.

Malantaŭ nubmantel' kovriĝas lun'
kaj knare arbo ĝemas al ĉielo.
Responde hurlas vento tra malhelo.

Sed ŝajnas al mi, ke en Esperanto la viraj rimoj havas ian *pinton*; ian petoleman akcentitecon, kiu tute ne harmonias kun la humoro de ĉi tiu poemo. Mi opinias, ke per la almeto de la finaĵoj la poemo gajnus.

En la novembra numero de FRANCA ESPERANTISTO mi legis veran artikolon de Raymond Schwartz. Per trafaj ekzemploj li ilustras, kiom ofte oni parolas, kiam la parolo estas nenecesa, eĉ ĝena, kaj kiom ofte oni silentas, kiam oni devus paroli. La artikolo finiĝas jene: »Vidu la geamantojn! — (se vi povas, ĉar ĝenerale ili kaŝas sin...) Jen hometoj, kiuj dezirus kun ĉiuj detaloj priskribi sian feliĉon, eldiri en historiaj vortoj sian amon, sian ĝojon, sian admiron, sian Dio-scias-kion, kaj ili silentas. Estas vere, ke ili staras sur la sojlo de gravaj decidoj. »Ĉu jes? Ĉu ne?« — Kaj saĝe konsilas la proverbo, ke antaŭ ol diri definitivajn stultajon, oni devas turni almenaŭ sepfoje la langon en la buŝo. Kaj tio ŝajne estas la sola konsilo, kiun la geamantoj konsentas obei. Tial, antaŭ ol interŝangi po-eterajn jurpromesojn, tre konsciencie, kaj pli ol sepfoje, ili turnas la langon en la buŝo... unu de la alia.«

La novembra numero de Esperanto (UEA) aperis kun varia enhavo riĉa je raport-materialo. Sed ĝi prestiĝis per verdaj literoj sur la lumreflektanta papero. Legantoj kun malfortaj okuloj ne ĝojos al la novigo!

En HEROLDO mi legis tre belajn, poezi-inspirajn, harmoniplenajn liniojn de Minuška Mantel, pri la aŭtuno. Sed kial ŝi uzas »budgeto« anstataŭ »budĝeto«?

Jen nova faggazeto: RADIESTEZA GAZETO. Laŭ la programo ĝiaj celoj: 1.) propagandi radiestecon per Espe-

konservas la uzon de unusola prepozicio por ĉiuj okazoj, kiam la kunteksto ne allasas dubon. Tio estas konforma al la principo de la »neceso kaj sufiĉo«. Kaj konforma ankaŭ al la principo de la senrompa evoluigo, kiu, laŭ mia opinio, povas teksti jene: bona novismo estas nur tiu, kiu ne malebligas uzi paralele ankaŭ pure Fundamentajn formojn. La neobeo al tiu ĉi principo igas senŝancaj la formojn PAR kaj AB, aŭ la DI, DE, DA de S-ro Joab Eljot di K. Ĉi lastaj krome havas la malavantaĝon, ke ili estas tro similaj, kio malfaciligas ilian distingon, kaj pro kio ili estus ĉiam intermiksitaj de la uzantoj.

*

Tria afero: ĉu vere lingvo uzata ekde kvindek jaroj estas tiel malmulte elprovita, ke oni ne povas ankoraŭ fiksi baze de ĝia praktika uzado difinitajn regulojn? Mi kontestas tion, precipe se temas pri tiel elementa afero, kia estas la vortkunmeto.

Altestime:

K. Kalocsay

ranto 2.) propagandi Esperanton inter la ĉiulandaj radiestelistoj. Nu, certe, kiel nova fakgazeto ĝi estas nepre salutinda, sed la nivelo de kelkaj artikoloj — almenaŭ por ni, kiuj ankoraŭ ne estas adeptoj de tiu novaĵo — ŝajnas iom naiva...

En la oktobra numero de la franclingva gazeto ESPERANTO LERNEJO mi legis interesan raporton pri la someraj kursoj en Poissy el la plumo de Henriette Deshaies.

Sub titolo »PER UNUIGITAJ FORTOJ« aperis nova gazeto. Ĝi klopodas iĝi ĝenerala gazeto de Esperantujo, kun internacie interesa enhavo, ĝi intencas sendepende kaj rekte diri sian opinion, kaj disponigas sian lokon ankaŭ por kontraŭopinioj. Eble por tiel serioza programo la amplekso de la revuo ne estas kontentiga. La unua numero prezentas tre varian, viglan enhavon. Ankaŭ la ŝerca rubriko estas plaĉa. Bonan prosperon!

L' ESPERANTO — kiel ĉiam — estas unu el niaj plej bonaj propagandaj gazetoj. Ĝiajn batalpretaĵojn, spritaĵojn, kovvinkojn, itallingvajn propagandartikolojn mi legas ĉiam kun granda interesiĝo.

En LITOVA STELO legeblas interesa rememoro-serio. En la julia-aŭgusta numero troviĝas rememoroj de prelato A. Dombrowski kaj s-ino T. Zilbernik-Kocin, fratino de la edzino de Zamenhof.

En LA JUNA VIVO denove aperas novelo, sub kiu estas skribita la nomo de la tradukinto, sed la nomo de la aŭtoro troviĝas nenie! En la sama numero troviĝas belela poemo de Danjjan Vahen, jen la unua strofo:

Vasta, vastega estas la mondo,
milfoje mil stratoj,
milfoje mil vojoj
gvidas sencele tra mondon...

Fine en tiu numero mi trovis poemon de Ludmila Jevsejeva, en kiu mi trovis la jenan verslinion:

Lasu fali do la pluvfaden',

Min vere mirigas, ke samideanino Jevsejeva ankoraŭ ne scias, ke oni ne povas elizii substantivon en akuzativo? Kaj ankoraŭ pli mirigas min, ke redakcio de porjunulara instrua gazeto presigas tiajn malkorektaĵojn.

En la PRAKTIKO aperis listo pri la esp-a esprimo de la diversaj bestaj sonoj, jen:

la hundo bojas
la kato miaŭas
la bovo muĝas
la ĉevalo henas
la porko gruntas
la koko kikerikas
la kokido pepas
la kokino klukas
la urso grumbas
la lupo hurlas
la elefanto trumpetas
la muso cincas
la korvo grakas
la abelo zumas
la rano kvakas
la grilo ĉirpas
la turto kveras
la kolombo rukulas
la cikonio klakas
la strigo ululas
la pigo babilas
la kukolo kukas
la mevo krias
la vanelo kvikas
la serpento siblas
la najtingalo kantas.

Certe ĝi ne estas ankoraŭ kompleta, niaj legantoj kompletigu! Nun mi aldonas, nur, ke *la vulturo kriĉas*. Krome, la kukolo prefere *kukuu!*

Dum niajn grandajn movadajn gazetojn videble lacigis la organiza batalo kaj ili kontentiĝas pri raportado,

laŭeble plej seka kaj sterila, NIA GAZETO iom post iom iĝas nia vera ĝenerala revuo, al kiu sola devas sin turni la inteligenta esperantisto, se li volas orientiĝi pri la vivo de nia Esperantujo: li trovas en ĝi eĉon pri ĉio grava, eĉon certe originalan, kiun la leganto ne ĉiam pravigos, sed kies vervon kaj spriton li kontestos... En la novembro numero ni trovas daŭrigo de la romano »De Epifanio Gis Silvestro«, kies aŭtoro nomiĝas Jozefo Darvas kaj kiun lerte kaj kun fideinde bona stilo tradukis (el la hungara) Ladislao Spierer. En ĉi tiu daŭrigo troviĝas eĉ parto de kantoteksto, kies aŭdaca obsceno estus ruĝiginta mian honteman vanghaŭton, se feliĉe sinjoro Spierer ne obscenus per *scienca termino*. Sed tiel la ruĝigon mi ŝparis... En la sama numero troviĝas bela novelo de Jacobsen: Ĉi tie devus stari rozoj, tradukita de Ina Mo. — Kaj nun permesu al mi, ke mi citu du el la anekdotoj de tiu ĉi numero. Unue: *Difino*. — »Paĉjo, kio estas hipohondriulo?« — »Tio estas viro, kiu sentas sin nur feliĉa, se li estas malfeliĉa.« La dua: *Nur Momento!* — Gvidisto, al kelkaj sinjorinoj: — »se vi havus la afablecon silenti por momento, vi povus aŭdi la imponan bruegon de la akvofalo.« — En la rubriko *tra la gazetaro* mi legis demandon koncerne la devenon de mia opinio: »ke »Nia Gazeto« rigardas la ekfloron de la poezio la plej grava danĝero por la movado...« Nu, kial »Nia Gazeto« demandas ion, kion ĝi plej bone scias? Komprenoble mi aludis la artikolon de sinjoro Era, en kiu li opiniis, ke nia movado malsanas ĝuste pro tio, ke nia literaturo tro progresas. Eble vi diros, ke estas troigo de mia parto, se mi identigas sinjoron Era kun Nia Gazeto. Eble... sed ĉu tia malprecizeto ne estus pardonebla de la parto de sentema poeta koro, kiun komprenoble iom pikis tia artikolo, en kiu oni rekomendas al li (kaj al liaj poetokunuloj) verki propagand-artikolojn aŭ — iri en la inferon! Kaj ĉu tian malprecizeton ne povus pardoni ĝuste Nia Gazeto, kiu — mi rekonas — klopodas sincere al registrado de precizaj faktoj, kaj al kiu tamen okazas, ke raportante pri Esperanta radio-disaŭdigo, kun bedaŭro ĝi mencias la foreston de esperantista verkisto, kiu tamen efektive partoprenis la disaŭdigon?

La nunan revuon mi volus fermi per cito de poemo kaj mi ne devas longe serĉadi, same en Nia Gazeto mi trovas poemon de Lucien Thévenin, kiu meritas la citon. Mi pene klopodos ĝin precize kopii, ne ŝanĝante eĉ la skribosignojn... Jen la poemo:

La vana kanto.

Fermita estas ĝi en kaĝo
Kaj el malliberejo sia
Birdeto kantas kun kuraĝo
Sed vane al birdet' alia.

Ĝi kantas sian tutan vivon
Kun obstineco kaj espero
Ne komprenante la motivon
De sia senutila kvervo.

La kanto tamen estas bela
Kaj en aero freŝe migras
Al firmamento blue hela,
Al arbarego kie nigras...

Poeto el ebura turo,
Simile al birdeto, diras
Al la silento de Naturo,
Al la ĉielo kiu miras

La kanton de fervora koro.
Subite lia voĉo plendas;
Al ĝojo kiel al doloro
Respondon vane li atendas...

La kanto tamen estas bela
Kaj en aero freŝe migras
Al firmamento blue hela,
Al arbarego kie nigras.

John Atkins

ARGENTA DUPOPO; Jubilea libro pri Baghy—Kalocsay II-a volumo. 124 paĝoj kaj 34 paĝoj da muziknotoj. 23.5×15.5 cm. 1.10 dolaroj.

En la sama eleganta eksterajo kiel la unua volumo aperis la dua de la verkaĵo, kiu eldoniĝis por soleni la argentan jubileon de l' esperantigo de niaj du plej eminentaj Esperantaj verkistoj; Baghy la aŭtoro de jam multaj originalaj verkaĵoj kaj Kalocsay la genia tradukisto kaj gramatikisto. Nia literaturo estus neimagebla sen ili. Dum la unua volumo de la Argenta Duopo enhavis artikolojn pri la du jubileantoj, la dua enhavas specimenojn el la verkaĵoj de ili; tekstoj parte jam publikigitaj parte tute novaj por nia publiko. La vicon komencas pluraj el la originalaj poemoj de ambaŭ poetoj kaj kelkaj el la tradukaĵoj de Kalocsay, inter ili surprizis min manko de specimeno el la Infero de Dante, pri kiu oni neniam sufiĉe povos atentigi la literaturamantojn. Sekvas artikolo de Baghy pri Milito aŭ Paco kaj beletra specimeno. Ĉar la nomo de la verkinto tie estas metita al la fino de la teksto, estas amuze dum la legado eldiveni el la stilo la verkinton, kio cetere pro la granda diferenco inter la du aŭtoroj ne estas tre malfacila. Baghy daŭrigas per amuza memintervjuo kaj ankoraŭ pli amuza tragikomediana sceno pri Lingva Evoluo, kie lingva modernulo devas paroli iene por ridindigi la klopodojn de la neologismemuloj: »Estu darfe diri, ke oldulo ne povantas apreci la progreses etoson, kiun forcas la moderna evoluo. Vi tro egardas la paseon por delekti avantaĝojn. Senioro, vi krablas; mi, bacheloroj, hastas.« Tre lerte farita satiraĵo, kiu tamen ne haltigos la primokatan lingvan evoluon. Kalocsay surprizas la leganton per nova literatura speco, en kiu oni ankoraŭ nemulte aŭ nenion legis de li. Temas pri mallonga teatraĵo, verkita antaŭ 17 jaroj okaze de landa kongreso. Ĝi estas senpretenda sed lerte farita kaj ĉar ĝi ne nur estas ia farso, sed ĉar la temo estas prenita el la tipe esperanta vivo kaj multe rilatas Esperanton ĝi estas ekstreme taŭga kaj ĉar oni krome nur bezonas kvin aktorojn, ĝi certe estos multe ludata en niaj grupoj. La redaktantoj de la argenta libro pravis elfosi ĝin el la tirkesto de nia literatura doktoro, kaj mi pensas, ke eble ili eĉ estus devintaj fosi iom pli profunden en la tirkesto por serĉi similajn tekstojn de »publika utileco«. Baghy ankaŭ partoprenas per teatraĵo »Ni vivas kiel la Kolomboj«, kiu iom strange miksas komikajn elementojn al serioza geedza drameto. Tre valora aldono al la libro estas la 34 paĝoj da muziknotoj al poemoj de ambaŭ aŭtoroj. Kun surprizo mi vidis, ke Kalocsay scias ankaŭ komponi. — Kiel tuto, la volumo bone sukcesis, kaj kune kun la unua volumo formas imponan kaj luksan libron, kiu estas inda honoraĵo al la jubileantoj.

Arthur Baur.

JOLANTA FÖLDES: LA STRATO DE L' FISANTA KATO. 268 paĝoj, 13.5×20 cm. Tradukis el la hungara Ladislao Halka kaj Ladislao Spierer. Eldonis »Literatura Mondo«. Prezo: broŝ. 1.—, bind. 1.25, lukse bind. 1.55 dolaroj.

Ĉu vi ne volas partopreni dum kelka tempo la vivon de la elmigrintaj senhejmuloj en eŭropa grandurbo? Devas esti interese por vi, de proksime observi tiun vivon, kiu estos por vi io tute nova, kaj konatiĝi kun la bedaŭrindaj homoj, kiujn la sorto pelis for de la fundo, kie ili radikiĝis. Pro la granda milito, kiu portis tiom da renversoj al nia malnova kontinento, sennombraj homoj devis forlasi sian patrujon, kelkaj pro malriĉeco kaj manko de laboro, multaj pro politikaj kaŭzoj. Tiuj homoj kolektiĝas en la metropoloj de tiuj landoj, kie ankoraŭ ne estas krimo havi alian opinion ol la oficialan. Ili formas apartajn ĉelojn kaj vivas vivon, kiu malmultan komunecon havas kun la vivo de la indiĝena popolo. Parizo verŝajne estas la ĉefa centro por elmigrintoj kaj mi konsilas al vi tien direkti viajn paŝojn kaj laŭ la gvidaj indikoj de Jo-

lanta Földes serĉi la straton de la fiŝanta kato kaj lui ĉambron en malkara hotelo tie. La kvartalo nepre ne estas eleganta, sed la homoj ne vivas tie por sia plezuro, kaj se vi volas konatiĝi kun ili vi devas serĉi ilin en siaj loĝejoj. Post via ekloĝo vi baldaŭ konatiĝos kun la laborema peltisto Barabás, kiu post la milito venis el Budapeŝt, ĉar lia metio tie ne plu povis lin vivteni. Lia edzino estas bona patrino kaj laborema virino, sed ŝi tamen verŝajne ne kaptos vian specialan simpaton, kontraŭe vi certe havos plezuron per la tri infanoj: la dekdulara Annuŝ, kies nomon vi post longa meditado ekkonos kiel derivaĵon de Anna, la iom pli juna, malafabla sed tre inteligenta kaj ekstrema energia Klari kaj la sola filo de la familio, Jani. Certe vi emus okupiĝi pri la infanoj, sed tiun oficon jam fervore plenumas la maljuna rusa bankiero Bardihinov, kiu, atendante, ke la blankuloj forpelos la ruĝulojn el Ruslando, protektas la tri infanojn, instruas ilin kaj rekomendas ilin al siaj novaj francaj instruistoj, ĉar malfacile estas pro fremdaj infanoj teni sian pozicion en bordo de fremdaj mokemaj infanoj. La evoluo de la tri infanoj vi observos kun plezuro, ĉar ĉiuj estas lertaj kaj kiel vi poste povos konstati, ili kun sukceso batalas al si vojon tra la vivo. Dum la vesperoj vi descendos al la kafejo de la hotelo por sidiĝi en la cirklo de la elmigrintoj, kiuj diskutas kutime pri la plej gravaj demandoj de la homaro. Kvankam la konvinkoj ege diferencas — jen sidas iamaj riĉuloj apud anarkistoj kaj komunistoj kaj poste aliĝas itala eksministro kaj fine eĉ elmigrintoj el la Hitlera Germanio — iliaj disputoj restas amikaj, kaj komunaj zorgoj, ĉu pri malsaniĝo de Bardihinov aŭ pri la subita morto de ilia komuna tre ŝatata amiko Vasja kvazaŭ formas familian rondon el ili. Ho, vi miros, kiom la eksterlando (kiu laŭ la signifo de oldgermana vorto estas identa al mizero) ŝanĝis la homojn, forigis la klasorgojlon, mildigis politikajn antagonismojn kaj eĉ ĉiu homo aperigas lian puran homan valoron (aŭ, kiel en la kazo de la fripono Piŝta, lian ne-valoron). La ekzistado de tiuj elmigrintoj staras sur tiel malforta bazo, ke malgravaĵo jam minacas ĝin. Jen ia politika okazaĵo, kiu tute ne koncernas la elmigrintojn, kaj tamen jam ili devas senti la sekvojn. Hungaroj subite estas neŝatataj, kaj patro Barabás kaj Annuŝ perdas siajn oficojn. Ili elmigras al Argentino, sed vi ne bezonas sekvi ilin. Nia gvidistino ne montras grandan elvokan talenton koncerne la sud-amerikan kontinenton, kaj vi trankvile povas resti en la strato de la fiŝanta kato, ĝis ili revenas kun malbonaj spertoj kaj difektita sano. Ili trovas novan laboron kaj la vivo procedas sen grandaj emocioj. La infanoj kreskis, jam ili estas maturaj kaj la amo ĉirkaŭfloras ilin. Sed estas malfacile por la elmigrintoj fondi familion kun ano de la gastiganta popolo. Kvankam ili vivis en Parizo jam de sia junago, ili ne sukcesis intimiĝi kun la francoj. La francoj rigardas ilin ĉiam kiel eksterlandanojn, kaj ili mem ankaŭ ne tre klopodas por asimili sin al la nova popolo. Tie ili staras, fremduloj en fremda lando, kaj se ili provas rehejmiĝi, ili kun doloro devas konstati, ke ankaŭ tie ili perdis la kontakton kun la prapatra sojlo. Senradikaj ili estas kaj restas. Tiu sorto trafas ne nur nian hungaran familion. La bela viena grafino, kiu servas kiel manekeno, suferegas pro soleco, kaj eĉ la anĝelo bela Pia Monica, la filino de la itala eksministro, ne renkontas svatanton kaj pereos en fora kontinento. Vi ne envios la elmigrintojn, kaj, ĝojante ke vi ankoraŭ povas rehejmiĝi, vi forlasas viajn amikojn en la strato de l' fiŝanta kato. Malfeliĉa estas ilia situacio, eĉ se ili sukcesas perlaboro liberiĝi el la mizero. »Unu aŭ du ektenos sur la fremda tero. La aliaj? Malaperos, malrapide kaj sen postsignoj.«

Vi dankas al via bonvola gvidistino, la hungara verkistino, Jolanta Földes, kiu jam ĝuas grandan reputacion en la eŭropa literaturo, sed se vi estas kritikema, vi ne preterlasos konstati, ke ekzistas ĉapitroj en tiu romano,

kie la streĉo senteble malfortiĝas, aŭ kelkloke vi konfide-nci diros al la verkistino, ke ŝi pli zorgeme forkaŝu la ŝnurojn, per kiuj ŝi tenas siajn marionetojn; ekzemple sur paĝoj 205—10, kie, unu post la alia, personoj, kiujn oni jam supozis eligitaj el la komponaĵo, reaperas kaj ankoraŭfoje prezentigas al vi — senutile.

La ĝuo de la romano estas tre faciligita al vi per la bonega traduko, en kiu ne estas trovebla serioza kritik-endaĵo. Tamen por ne-hungaraj oreloj frazoj kiel »Ĉi tie ne fartas bone Annuŝ« kun la tre stranga pozicio de la subjekto, malgraŭ la gramatika korekteco, sonas kiel hun-garismo. La vortordo teorie estas tute libera en Espe-ranto, sed certa konvencio ekzistas, kaj la cititan vort-ordon oni apenaŭ trovas aliloke ol en hungaraj tekstoj. Alia naciismo ŝajnas esti »tamen troviĝas, kiu povas iri hejmen« kie la unua frazo laŭ okcidenta lingvosento devus havi subjekton al kiu la »kiu« rilatas. Jen mi citis du sintaksajn subtilaĵojn, eble interesas hungarajn traduk-istojn, kion ne-hungaro rigardas kiel hungarismojn.

La romano de Jolanta Földes, kiu pritraktas temon, kiu de dudek jaroj estas aktuala kaj ĉiutage eĉ ankoraŭ pli aktualigita, certe inter la esperantistoj faros sian suk-cesplenan vojon, same kiel ĝi jam faris en la dekdio aŭ pli da naciaj lingvoj, en kiuj ĝi aperis post la granda sukceso, kiun la aŭtorino rikoltis en internacia literatura konkurso.

Arthur Baur

FRANCISKO MOLNAR: LA KNABOJ DE PAULO-STRATO. El la hungara: Ladislao Spierer. 180 paĝoj. Eldonis: The Esperanto Publishing Co. Anglujo. Prezo: ŝl. 2.—, plus aŭfranko.

Tiu ĉi libro apartenas al tiuj porknabaj romanoj, kiuj estas evento ankaŭ por la plenkreskulo. Kio estas ĝia sekreto? Nu, la elstara forto de la vizio, la senhalte marŝanta iro de la rakonto, la perfekta kono pri la knaba psiko, la surtabligo de la fabelo tiamaniere, kvazaŭ iu el la knaboj rakontus ĝin. Neniām sentebles la plenkreskula verkisto, kiel eĉ multaj tiuspecaj verkoj. Kaj fine la herooj de la romano: tiuj ĉi simpatiaj, el karno kaj sango konsistantaj figuroj, kiujn neblas forgesi... Sed mi ja ne rakontos pri ili aparte, ja ĉiu leganto legos ĉi tiun libron, kiu ne legi estus peko kontraŭ si mem!

La merito de la traduko de Spierer konsistas ĉefe el tio, ke oni ne rimarkas, ke oni legas tradukitan libron. Rimarkinda estas la fervoro kaj memperfektigo, per kiu la tradukinto elbatalis por si tiel bonan lokon inter niaj prozotradukistoj. Tamen li permesu kelkajn rimarkojn: Sur paĝo 11.: Sur paĝo 16.: ĉu la uzo de »scipovi« nepre necesis? Sur paĝo 41.: »iom de timo« ĉu preseraro? Sur paĝo 57.: kial »plena per« anstataŭ »plena de«? Sur paĝo 72.: »Li certe ion volas de la slovakoj, se li komen- ciĝas per cigaroj!« Nu, la tradukinto sciigis min, ke en la manuskripto staris »komencas«, ĉu la eldonejo regalis nin per tia ŝerco? Sur paĝo 99.: »... morgaŭ decidis milito pri la sortoj de nacioj«. Ĉu unu sorto por unu nacio ne sufiĉas? Ekzistas ankaŭ kelkaj pli grasaj pekoj: manko de subjekto en subordita frazo (certe pro mal- atento); *supretenita* kapo (anstataŭ *tenata*); li rigardis, ĉu li povis (anst. *povos*); ĉu oni povas rigardi *sensence*? (eble: *senkomprene*); kaj Boka kurante venis kun la slo- vako de la maŝindomo (kaj Boka kun la slovakoj kurante venis de la maŝindomo) la slovakaj parolmanieroj estas tre mallerte montrita (ekz-e: konjstri-ingeniero; grand- ajn domojn): neniām slovakoj parolus tiel Esperanton; — estas bedaŭrinde, ke ĉi tiuj malglataĵoj, kun pluraj pluaj, ne estas elsarkitaj, prefere ol »korekti« *komenciĝas*, kie necesus *komencas*.

Tamen, la verva marŝo de la rakonto estas sufiĉe impeta, por forbalai senrimarke el la vojo de streĉa leganto ĉiujn ĉi etajn stumblilojn.

John Atkins

D-RO FRANCISKO SZILÁGYI: ELLERNU. Pro- gresa kurso de Esperanto. 112 paĝoj. Eldonis: Literatura Mondo, Budapeŝto, 1937. formato 15½×23½ cm. Prezo: 56 dolarcendoj, plus 10% por sendkostoj.

Unu el tiuj libroj, pri kiuj rajte oni povas aserti, ke

ĝi plenigas mankon de nia literaturo. La ĝisnunaj libroj, kiujn oni rekomendis al ni ĝvidlibro por la progresaj kursoj, esence estis nur legolibroj. Kaj ĉiu kursgvidanto scias bone, ke post la fino de la komenca kurso la kur- sanoj bezonas ion alian ol legolibron. Post la kutime sufiĉe mallongdaŭraj komencaj kursoj la gramatiko ne sidas tiel firme, ke oni povus simple transiri al la lego, sen plua ekzercigo de la gramatiko.

Kaj ĝuste tio estas la granda avantaĝo de la Szilágyi- libro, ke ĝi kontentigas ambaŭ bezonojn. Per elekto de facilaj, sed interesaj kaj valoraj tekstoj, per konigo de kelkaj ĉeffiguroj de nia literaturo, per lerta apetitveko al niaj verkistoj, ĝi plenumas la rolon de legolibro por tiuj, kiuj ĵus finis la komencan periodon de sia esperantisteco, sed aliparte per la konscienca tralaboro de la teksto el gramatika vidpunkto, per la sprita varieco de la ekzerc- specoj, per la ĉiam vigla kaj vigliga stilo la aŭtoro suk- cesas laborigi la mensojn de la lernantoj ĝis la jam kon- ata gramatika materialo el la *konata* iĝas porfunde, ne- forviŝebla *sciata*.

Ni vidu iom pli detale la sistemon de la aŭtoro. La libro enhavas 18 lecionojn, la lecionoj ĝenerale divid- iĝas je kvin partoj. La unua temas pri la gramatiko. Nu, ne sekaj gramatikaj reguloj, sed ia tasko, laŭeble ĉiam ali- speca, per kies helpo la lernanto lude eklernas aŭ ripetos eĉ la plej komplikajn regulojn. Ekzemple oni ricevas tekston kun eraroj, kaj la kursanoj devas mem korekti la erarojn kaj nur poste kontroli la korektitan tekston per la Kont- rolo, troviganta en la kvina parto de la leciono.

La dua parto nomiĝas Konversacia parto. Ĝi enhavas plurajn bildojn, laŭeble ŝercajn, kaj la babilado sekvas la okazaĵojn montratajn sur la bildoj. Ĉiu bildo vekas asociojn pri ia temaro kaj la aŭtoro abunde eluzas la temon. El tiu ĉi vidpunkto la konversacioj de la progesa kurso estas pli sukcesaj ol tiuj de la komenca kurso de l' aŭtoro. En tiu libro la instrumenton kelkfoje nervozigis la manko de temo-kerno, la konstanta, abrupta transsalt- ado de temo al temo. Ĉi tie la temoj estas pli abunde el- ĉerpataj kaj tiel rezultas, ke en la kursanoj daŭre fiksiĝas la vortoj de la elektitaj temo-kernoj.

Ni vidu, kiel multajn kaj utilajn demandojn povas fari la aŭtoro pri tiel simpla bildo, kie ni vidas sinjor- inon, kiu faris torton. Jen la demandoj: »Kion faris la sinjorino? Kia estas la torto? Kian torton vi ŝatas? Kiu hakis la torton? Ĉu vi ŝatas bakajojn? Kiaj estas la bak- aĵoj? Kia estas la citrono? Ĉu vi estas bakisto? Kie estas la plej proksima bakejo? Kie oni vendas tortojn? Kian fajrujon vi havas? Kiaj estas la plej modernaj kuiriloj? Kion oni faras pri la teo? Ĉu oni glaciigas ĝin? (Ne, oni boligas akvon por ĝi.) Kio estas la nomo de la varma *mal- seka aero ĉe la bolco*? Ĝi estas vaporo. Kiam vi estis en vaporbanejo? Kion faras la sinjorino? Kien ŝi metas la torton? Ĉu la seĝo estas alta? Ĉu ŝi estas kontenta pri la torto? Kial la sinjorino metas la torton sur la seĝon? (Ke ĝi malvarmigu.) Kion vi pensas, kial ŝi bakis torton? Ĉu ŝi atendas gastojn? Kion ŝi volas fari per la torto? (Ŝi volas *regali* la gastojn.) Kiam vi havis gastojn ĉe vi? Kiom da gastoj vi regalis tiam? Ĉu vi faris festenon? (Festeno: granda regalo.) Kiam oni arangas festenojn? Kiam vi partoprenis festenon? Kiu regalis vin lastfoje? Kiam vi havis eksterlandan gaston?»

La tria parto okupiĝas pri la literaturo. Ĝi donas facilajn noveletojn, poemojn, konigas iliajn aŭtorojn, funde kaj multfoje tre sprite klarigas la malfacilajn vortojn de la teksto, avertas pri gravaj verkoj de nia litera- turo, eknkondukas la novulon en nian spiritan atmosferon. La tekstoj estas bone elektitaj.

Certe la kvara parto akiros plej grandan popular- econ ĉe la kursanoj. Ĝi nomiĝas Grup-ludo. Nu, la fan- tazio de Szilágyi estas vere neelĉerpebla kiar: temas pri eltrovo de tiaj vigligoj... Ili estas talente elektitaj por atingi la duoblan celon: helpi al la vortmemoro kaj parol- igi, ĉiam nur paroligi la kursanojn.

Kompreneble detalajn rimarkojn oni povas fari nur, se oni jam mem elprovis la libron dum kurso. Mi estas konvinkita, ke ĉiu kursgvidanto sentos la saman ĝojon,

kiun mi sentis, kiam mi prenis en manon la plaĉ-aspektan, bonpaperan, riĉe ilustritan libron (la desegnaĵoj de E. Preiss estas tre spritaj kaj talentaj).

Ĝis nun mi diris nur laŭdojn, ĉar la libro tiel min entuziasmigis, sed fine mi tamen rememoras, ke mi skribas recenzojn, do la recenzo ne estu tute sen riproĉo... Kaj mi havas gravan riproĉon: la libro prisilentas la vortkonstruon! Kiam do paroli pri ĝi, se ne en progressa kurso? Oni ja instruas la lingvon, kaj tre inteligente, kiel Szilágyi faras tion, nur eĉ vorton oni ne diras pri la struktura bazo de la lingvo! Ĉu pacienco mankis aŭ kurago tuŝi ĉi tiun temon, kiu al kelkaj ŝajnas tiel dorna, sed kiu esence estas tiel simpla kaj simple klarigebla?

Lali Blond

KAREL ČAPEK: LA BLANKA MALSANO. Triakta dramo en 14 bildoj, 100 paĝoj. El al ĉeĥa tradukis: Th. Kilian. Eldonis: Moraviaj Esperanto Pioniroj, Olomouc. Formato 20.5×15 cm. Prezo: ĉ. kr. 15.— broŝ., 18.— bind.

La temo estas aktuala: la problemoj de la nuna mondo, kiuj gvidas al la neevitebla milito kaj homoj, kiuj volas malhelpi la militon. La aŭtoro pripentras ian novan epidemion, specon de lepro, kiu furiozas inter la homoj pli aĝaj ol 45 jaroj. Iu kuracisto eltrovas la kuracilon, sed li volas malkaŝi ties hemian kunmetaĵon nur tiam, se la gvidantoj de la homaro konsentos neniigi la armilojn kaj efektive faros neebila la pluan militadon. Drama lukto sceniĝas inter la potencaj gvidantoj kaj la solola kuracisto, kiu tamen en sia rifuzo kuraci la potenculojn estas same senindulga, kiel tiuj en la gluigo al siaj ideoj. La fino de la dramo alportas nenian pozitivan solvon, kiel la aŭtoro diras: »ni ne povas solvi ĝin per vortoj, kaj ni devas lasi la solvon al la historio«. La dramo abundas en streĉe tragikaj scenoj plenaj de profunde homaj vibradoj.

La stilo de la traduko estas senriproĉa.

John Atkins

MUUSSES ESPERANTO BIBLIOTEKO. Esperanto Eldonejo. J. Muusses—Purmerend, Nederlando. 30 paĝoj. Formato: 19.5×13 cm. Prezo: gld. 0.35.

N-ro 13. En la vagono. (Kaj aliaj rakontoj.) De Ivan Ŝirjaev.

Tri originalajn novelojn enhavas ĉi tiu volumo de nia fama rusa samideano Ŝirjaev, kiu mortis antaŭ kelkaj jaroj en 1933. Li laboris tre diligente sur nia literatura kampo, li iniciatis ekzemple la »Esperantan Enciklopedion« kaj tradukis (sed ili ĝis nun ne estas eldonitaj) inter aliaj la »Fratojn Karamazov« de Dostojevskij kaj la »Militon kaj pacon« de L. Tolstoj, ktp.

Li verkis multon ankaŭ originale, jen tri interesaj diverskarakteraj noveloj el ĝi.

»En la vagono« estas la unua. En ĝi temas pri stranga aventuro de fianĉo, kie tamen la fianĉo estas la pli ruza, ĉar li sukcesas ĝustatempe rifuĝi el la brakoj de belega kaj danĝera kunvojaĝintino.

»La malamiko« temas pri severa rusa kapitano, kiu devas esplordemandi militkaptitojn. Sed venas hungara militkaptito kaj ili ne povas interkompreniĝi. Felice la subulo de la kapitano, la juna leŭtenanto hazarde rimarkas, ke la hungaro komprenas Esperante kaj tuj mildiĝas la severeco de la kapitano, precipe, kiam li ekscias, ke la hungaro havas hejme — same kiel li — infanon. La du malamikaj patroj fariĝas amikoj pere de Esperanto!

Mi devas rimarki, ke stranga kaj komika numeraro troviĝas en ĉi novelo.

La hungara militkaptito nomas sian 8-jaran filinon »Mia Károlyné«! Ĝi signifas en la hungara lingvo la »edzinon de s-ro Károly«! Verŝajne Ŝirjaev aŭdis ĉi tiun nomon, kaj pensis, ke ĝi estas tipa hungara knabina vorto kiel ekzemple Tamara ĉe la rusoj.

»Tra la loko serĉita« estas denove aventura historio de pastro, kiu devas nokte ervaragi tra ŝlima, sorĉfatala loko. Legendo kaj mistiko traplektas ĉi tiun rakonton.

László Halka

LA MONDPERCEPTO DE LA ROZKRUCANOJ Aŭ MISTIKA KRISTANECO. Elementa pritrakto pri la disvolvigo de la homo en la pasinto, lia nuna estato kaj lia estonta disvolvigo. De Max Heindel. Maŝinskribita 176 paĝa volumo. Traduko. Eldono de la Rotterdama studcentro. Bergweg 308b. Rotterdam.

Nuntempe, kiam la scienco mem faligas la materialisman percepton de la lastaj jarcentoj kaj pruvas, ke la materio estas pli parenca al la animo, ol oni iam pensis, estas certe aktuala kaj tre interesa la Esperantlingva aperigo de konata fakverkisto pri esenco de la jarcentaj esploroj kaj konkludoj de okultaj eksperimentistoj kaj studentoj. En antaŭparolo oni petas objektivan juĝon. »La mondpercepto de la Rozkrucanoj ne estas dogma, ĝi ankaŭ ne apelacias je alia aŭtoritato ol la intelekto de la studento« — ja »ne ekzistas absolute generara apokalipso, kiu entenas ĉion sub kaj super la suno«. La libro do estas ne dogmo aŭ »kredo, donita unufoje por ĉiam.«

La volumo enhavas la 7 unuajn ĉapitrojn de la 19-ĉapitra verko kaj daŭrigo aperos, se la unua volumo trovis sufiĉan interesigon ĉe la esperantistoj.

Trastudinte la ĝenerale pezan, sed ofte kun interesaj rakontetoj spicitan verkon, oni ekkonas la evoluon de la animo, la ekziston kaj funkcion inter videblaj kaj nevideblaj mondoj, kiuj en sep diversaj, sed ofte samtempe kaj samloke efikantaj statoj montras la vojon de la animo de supro al malsupro, de malsupro al supro. »La fakto, ke la plej granda parto de la homoj ne povas vidi la supersentajn mondojn, ankaŭ ne estas argumento por la aserto, ke neniu tion povus«. Efektive, kiam la scienco povis pruvi, ke eĉ malantaŭ la dum jarmiloj firma, kaj nerompebla »atomo« funkcias mirinda energio, oni ne rajtas ion ajn apriorie nei, nur ĉar ĝi ŝajnas al ni fabelo: Mi jam aŭdis tian aserton, ke ĉio devas ie ekzisti, kion la homa fantazio iam ajn elpensis, ĉar homa animo povas nur tion esprimi, kio ie vere ekzistas.

Oni trovas vere multajn interesajn asertojn: »Kiel la filikegoj el la infaneco de la tero postlasis sian bildon en la karbotavoloj, kaj kiel la irita vojo de glacikampo, el longe forinta tempo, povas esti reserĉata per la postsignoj, kiujn ĝi gravuris en la rokojn, tiel ankaŭ la pensoj kaj faroj de la homo, neforviseble estas notitaj de la naturo en tiun reflektan eteron.« Ni jam scias, ke nenio perdiĝas en la eterneco, la lumoj de malproksimegaj steloj rakontas pri mondoj, kiuj pereis antaŭ jarmiloj, la ondoj de la radioj povas reaŭdigi la teran muzikon en ia spaco eble post milionoj da jaroj, do kial perdiĝu la ondoj de la pensado, radiantaj el la homa menso?

Oni ne atendu perfektan scion de la libro. La verkisto mem konscias, ke »la lernanto de la okulta skolo legas ion en la etero, sed li estas avertita, ke tiu etero estas *mal-sufiĉa*, kiel perilo por akiri *precizajn informojn*« kaj »... nia lingvo taŭgas nur por priskribo de materiaj aferoj kaj absolute nesufiĉas por priskribo de la statoj de la supermateriaj regionoj,« do ĉio ĉi estas »nur provo de priskribo«.

Oni lernas el la verko saĝan kaj mirindan legsekvon en la tuta vivo, ankaŭ en la tera, homa vivo. »Nenio en la naturo estas vandala... Tie, kie tio ŝajnas esti la kazo, la funkciado tamen estas boncela«. La samon per aliaj vortoj esprimis jam Goethe. Por subpremi la malbonon oni devas konstante serĉi en ĉio la bonon. Jen krista leĝo! — »Kiam ni amas la bonon, ni, kvazaŭ ŝirm-angelojn tenados ĉirkaŭ ni kaj nutros ĉion, kio estas bona.«

Ni vidas klarigon kun desegnaĵoj pri naskigo kaj efiko de la penso el la spirito ĝis materio. La vivantan spiriton prezentigantan en la minerala, planta, besta kaj homa mondo. Priskribo de la »vivigkorpo«, kiu estas en la homa korpo, kaj kiun kelkaj vidis jam, kvazaŭ spiritojn. Ni ekkonas la interesan misteran leĝon, ke okultajn eksperimentojn oni ne povas sukcese montri por mono aŭ por kontentigi scivolemulojn, »nur por helpi la homaron.« »Cielo, naskigo de korpoj, de pensovo, de sango, de leĝo; kaŭzoj, efikoj, rilatoj inter homo kaj dio... Ne, estas neeble doni eĉ ĝustan imagon pri la enhavo de la verko. Kiu interesigas, ne preterlasu ĝin trastudi. Eĉ la ne-kred-

anto trovas mirindan unikan faklibron pri studoj diskutindaj.

Lingvaj malfacilaĵojn mi ne multe trovis. Sur p. 29: »Kiam ne estus diferenco, laŭ mi pli ĝuste estas: »Se ne estus diferenco«. Sur p. 40 kaj 42. oni uzas »vitro«, laŭsence devus esti »glaso«. Akuzativo mankas en frazo. Sed mi eĉ ne daŭrigas. Ili ne gravas en tia verko. Mi esperas vidi la kompletigon!

P. B.

DAVID HEDEGARD: VORTO VIVA. El la sveda lingvo tradukis Erik Carlén. Eldonejo: Sveda K. E. L. I., Kumlå, Svedujo. 30-paĝa kajero kun titolo. Prezo du resp. kup.

La sveda sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia pravas ĝian bonan funkcion per eldono de tiu ĉi verko, kies titolo en sveda originalo estis »Kiel mi uzu mian biblion?« Nuntempe denove multaj homoj komencas serioze studi la biblion kaj retrovas en ĝi ne nur multajn saĝajn instruojn, sed ankaŭ mirindajn konsilojn por la leganto mem. La verko do estas valora instigilo kaj gvidilo: La biblio celas konduki nin en la kredon de Jesuo, ekvivigi latentajn fortojn, efektiviĝi per ni la farajon de Dio, oni devas travivi la biblion. Ĝi helpas al sinrekono, al ekkono de propraj mankoj kaj pekoj en lumo de Dio, ĝi estas realiganta preĝado. La stilo, lingvo estas korekta. Ĝi utilu al multaj homoj, ĉar ĝia sekvado certe eĉ pli grandioze transformus la vivon, ol la bonintencaj »paperkoraj« eldonitaj kontraŭ la kalumniado. Hungara verkisto skribis, ke la nuna mondo estas jam tiom mal-sanega, ke eble nur aferoj ŝajnantaj plej naivaj, povus ĝin savi. Se naiveco signifas infanan kredon, bonvolon, simplecon, ĉu ĉio tio ne egalas la puran amon? Ĉar ni devas rekoni, ke nur la amo povas savi la homaron.

P. B.

ESTU RADIESTEZA SERCIŜTO! Verkis Emile Christophe, tradukis Pierre Delaire. Eldonis Esperanto-Oficejo Orléans (Loiret) 63 rue de Patay, Francujo. 13.5x20 cm. 22¹/₄ paĝa, ilustrita. Prezo 35.— fr. fr. plus sendkostoj.

La unua verko en Esperanto, kiu klarigas la esencon de la nove malkovrita spertaro pri tio, ke ĉiuj vivaj aĵoj eligas el si radiadon. Laŭ la klarigo de la verkisto tiu radiado estas tiom forta, ke ĝi ekzemple estas sentebla ĉe pariza reĉeso de kliŝo pri persono, kiu estis fotografita en Usono, kaj kies radiotelegrafita fotografajo estis klišita kaj presita en Parizo. Tre ofte eligas tiajn radiadojn ankaŭ objektoj, tiel ke preskaŭ senescepte oni povas trovi ne nur ĉiun perditan aĵon per la pendolo aŭ vergeto de la serĉisto, sed oni povas konstati, ĉu tiu aŭ alia kuracmetodo aŭ manĝaĵo estas konforma al la organismo de la esplorata persono. Laŭ gazetartikolo franca, radiesteza serĉisto trovis la kadavron de malaperinta virino, tenante sian pendolon super geografia karto de tiu distrikto, kie la virino malaperis. Li sukcesis indiki per la radiadojn ne nur la lokon, kie la mortinto kuŝas, sed eĉ la specon de la arbo, sur kiu ŝi surpendiĝis kaj la direkton, en kiu ŝia korpo staras. Tiun ĉi radiadon la aŭtoro nomas nia sesa senso. Li alportas multajn ekzemplojn, ke tiun radiadon la homoj jam konas de tre malnova tempo kaj oni ankaŭ uzis sian kapablon por kuraci per la radiado kaj pro tio li klarigas multajn bibliajn miraklojn per la efiko de tia kuraca radiado.

Mi supozas, ke ĉi tiu scienco (se ni rajtas ĝin nomi tia) estas tamen sufiĉe freŝa, por ne doni pri ĝi definitivan opinion. Estas eble, ke la tuta pripensado montriĝos post kelkaj jardekoj nur kiel unu el la simptomoj de nia tempo, serĉanta mistikajn kaŭzojn por realaj okazaĵoj, ĉar ja la realo kruele nin trompis. Sed povas esti, ke el tiu ĉi bazo efektive formiĝos nia »sesa senso«, respektive ties ekkono. Tamen, estas necese almontri, ke ankaŭ tiu ĉi scienco plej unue postulas fidon de la uzanto mem. La tuta sukceso dependas de tio, ĉu la uzanto povas koncentri siajn pensojn en ĝusta direkto por fidante trovi la serĉatan solvon aŭ ne. Restas do tro multe da loko por la

klarigo de la motivoj, kiam la radioserĉisto ne sukcesas, kaj dubanto povas diri kun iom da rajto, ke eble la ĝusta koincido de faktoj, kiuj kondukas al rezulto, estas la hazardo, kaj ne la okazo, kiam la radiovergeto aŭ pendolo malsukcesas.

Sed ĉiokaze por homo pensema kaj serĉema tia libro devus esti interesa legajo: ĉu li volas fidi, ĉu li restas dubanta. Sed bedaŭrinde la libro ne estas tia pro ĝia ofte preskaŭ nekompreneble peza kaj stranga stilo. Antaŭ kelka tempo kelkaj samideanoj ekfunkciigis kontrolservon por gardi la lingvon kontraŭ ĉiu devojiĝo de la »zamenhofa« Esperanto. Nu, en tiu ĉi libro mankas neologismoj, mankas novaj eĉ iom kuragaĵaj vortformoj aŭ gramatiko-uzado, ĉio ŝajnas esti plej prolonge konforma al la lingvo-uzo de antaŭ tridek jaroj. Ĝi do devus esti bonega el la vidpunkto de la supre menciitaj samideanoj. Tamen, ni ripetas, la libro oftloke estas preskaŭ nekomprenebla. Ni povus mediti, ĉu niaj »purzamenhofanoj« laŭdos la libron, kiel konforman al la zamenhofa lingvouzo, (ne ŝajlo kompreneble), aŭ ili rimarkos, ke ankaŭ per la lingvouzo de antaŭ tridek jaroj oni povas verki libron apenaŭ kompreneblan kaj konsekvence rekonos, ke ankaŭ kelkaj stilaĵaj apartaĵoj aŭ kelkaj neologismoj, kiujn oni devas rigardi en la vortaroj, permesas ankoraŭ absolute klaran kaj kompreneblan stilon, depende de la talento de la persono, kiu verkis la libron.

Sed mi prezentu kelkajn ekzemplojn.

La unuaj frazoj estas ĉiam tiuj, troviĝantaj en la libro, la duaj, parentezaj, kiel mi skribus en pli moderna Esperanto. Vi facile povos decidi, kiu el ili estas komprenebla:

(... estas pretendemo, kiun mi nepre rifuzas miaĝas konsenti.)

(... estas pretendemo, kiun mi nepre rifuzas mia- parte konsenti.)

(... ke ekzistas, en kelkaj grandaj entreprenoj por la deponitaĵo skribita de la konceptoj eligantaj el la subuloj »ideoskatoloj«.

(... ke en kelkaj grandaj entreprenoj ekzistas specialaj kestoj, kie la subuloj povas deponi siajn ideojn por la plibonigo de la ofico.)

(... kiuj dependas de viaj naturaj antaŭemigoj (ĉu ne pli bone: inklinoj?).

esteco (= estado).

Studo pri la persisto sur la fotografaj reproduktaĵoj de la radiadoj, eligantaj el la vivantoj aŭ mortintoj.

(Studo pri tio, kiom persiste la radiadoj, eligantaj el la vivantoj aŭ mortintoj, restas eĉ sur iliaj fotografaj reproduktaĵoj.)

(... ĝi konsistas el ia ajn pezo, de ia ajn formo, de ia ajn substanco, ligita per ia ajn fleksebla fadeno.

(... ĝia pezo, formo, substanco povas esti ia ajn, ligita per ia ajn fleksebla fadeno.

Sed ni ŝparu lokon kaj ni mencienu nun kelkajn senkomparoj. Ja ili estas nediskuteble tre malbonaj esprimoj: por la eltirigotaj konkludoj; eksterordinaregajo; eksploremito; kiu ŝanĝigas la rezultatojn; la pendolo... elmovas (anst. ekmoviĝas); eksenhariĝo; la gepatroj ne sciis tiom pli ĝian nunestadon, kiom pli la patrino diris antaŭ kelkaj tagoj... (la gepatroj tiom ne sciis pri ĝia ekzisto, ke la patrino diris antaŭ kelkaj tagoj...) Vendebla (anstataŭ: vendata); tiu metodo, kiu konsistas sinturni al la Naturo, por montri ĝi mem tion, kio konvenas; necese estas havigi; oni movigas per la mano; estas fortaj probablajoj, por ke la kaŭzo de tiu maldeziro estu en la naturo de la radiadoj; eĉ nek la guston; rememoriĝo.

Kaj ĉio ĉi estas nur parto de la strangajoj, kiujn mi notis pacience nur ĝis la 60-a paĝo. Krome kompreneble taŭga kvanto da prezeraroj, kaj etaj aliaj eraroj, krome tre malfacilaj parafrazoj, oftaj eraroj ĉe la uzo de artikolo. (Ankoraŭ unu ekzemplo: Mi ne malesperas vidi la realigon, kun absoluta akurateco, de la identigo de persono per la radiadoj de ĝia subskribo. Ĉu ne multe pli kompreneble: Mi ne estas senespera pri tio, ke iam ni povos kun absoluta certeco identigi personon laŭ la radiado de lia subskribo).

Kaj je la fino, kiel pinton de la malbono ni vidas, ke la tradukon reviziis la sekretario de la Internacia Scienca Asocio Esperantista, per tio kvazaŭ aprobanta la nunan stilon. Mi kredas, ke nia laborema samideano Dupuis havas multe da laboro por ISAE, kiun li direktas vere tre diligente, sed tiuokaze kial li akceptas fari tiajn laborojn, kiujn li ne kapablas pro troeco de aliaj okupoj? Kaj kial li donas sian nomon al libro, kiu devus esti stile absolute ŝanĝita?

Mi bedaŭras, ke mi devis skribi tiom multe da malbono pri la verko de la vere diligenta kaj laborema samideano Delaire, kiu meritus, ke lia laboro estu helpata. Sed ĝuste lia verko estas plej bona ekzemplo por pruvi, ke ne ĉio estas facila kaj komprenebla, kio estas verkita laŭ la klopodo uzi nur la vortojn kaj stilojn de la jaroj 1900-aj kaj la tuta komprenebleco de iu verko absolute dependas de la talento de ĝia verkinto aŭ tradukinto, kaj ne de tio, kiajn vortojn aŭ stilpartaĵojn li uzas.

V. Bleier

DAN. A. LORD, S. J.: FLIRTO. Esperantigita de Frato M. Ludgertus. Esperanta Katolika Broŝuroj-Serio N-ro 1. Sub lingva kontrolo de Frato Wigbertus van Zon, L. K. Kinheim-Eldonejo, Heiloo. Paĝo 48. — Formato 15.5×8.5 cm.

La moderna vivo havas siajn problemojn, la moderna homo serĉas respondon al siaj plej urĝaj kaj gravaj vivdemandoj. Respondi al tiuj demandoj, doni la solvon laŭ katolika, religia vidpunkto estas la tasko de ĉi tiu bel-aspekta plaĉa Broŝuro-serio, kiun entreprenas la Kinheim-eldonejo.

La unua numero de la serio pritraktas la plejgravan misteron de la vivo, ĝian originon, valoron, la Diajn leĝojn de la seksa vivo. Ne estas temo, pri kiu oni publikigus pli da verkoj, romanoj, plurfoje kun suspektinda, eĉ triviala kaŝita celo, ol pri ĉi tiu. Jen la principa celo, kial tuj la unua numero de la serio klopodas klarigi tiun demandon. Sed la pritraktado ne estas seka, abstrakta disertacio, tute ne! Ĝi estas ĉarma, interesa rakonto pri bone edukitaj ĝemeloj, kiuj atingis jam la adoleskan aĝon. Venis novaj ĝemikoj, kiuj, iuvespere, kiam la zorga patrino ne estis hejme »flirtis« kun ili kaj kondutis »terure sentimentale kaj iomete vulgare«. Guste en ĉi tiu ne-dezirinda momento enpasis la patrino. La frato rigardis sin tute konfuzite, la fratino forkuris pro honto. Sed la novaj ĝemikoj tute ne embarasiĝis, ili kun ordinara ridego kaj flegma maniero pensis ĉion reordigi. La patrino plendas al malnova amiko de la domo, al Father Hall, simpatia paroĥestro, al kiu ankaŭ la ĝemeloj konfidencas. Dum kunpromenado en la belega, apuda arbaro ili preparolas amike la temon. La pastro komencas delikate aludi la belecon de la naturo, poste li transiras al la pli alta beleco kaj valoro de la homo, al kiu Dio donis la povon kunlaboradi en la kreado de novaj homoj. Tre delikate kaj serioze konigas nun Father Hall la doktrinon de la katolika eklezio pri la digno de la homa korpo kaj homa vivo, pri la volo de Dio rilate al edzeca vivo. Ĉiu vorto trafas la animon de la gefratoj, kiuj estas vere tute ravitaj de la bela doktrino de Dio pri la plej misteraj demandoj, kiujn oni nur malfacile povas klarigi al ĝeĵunuloj. Ne nur la du aŭskultantoj, sed eĉ la bonvolaj legantoj estas fakte ravitaj, kiel bele, dece priskribas ĉiun la eminenta aŭtoro. La broŝuro vere estas la plejtaŭga klarigilo por geadoleskuloj pri tiu delikata temo. La aŭtoro vere brile solvis sian taskon.

La tradukon prizorgis Frato M. Ludgerus sub la lingva kontrolo de Frato W. van Zon, malnova pioniro kaj vera amiko de ĉiuj esperantistoj. La zorga tradukado tamen ne sukcesis venki ĉiujn malfacilaĵojn de l' esperantigo. Oni sufiĉe malgrade sentas ankoraŭ precipe en la komenco, la fremdecajn turnojojn de la originala lingvo. Esperanto emas la plej grandan simplecon en gramatikaj formoj kaj stilaj frazoj. Estus dezirinde, ke la ŝatata tradukinto klopodu en la sekvantaj laboroj serĉi pli simplajn formojn por esprimi la kunmetitajn vortojn aŭ frazojn de la originalo.

Prof. Dro F. Erdey.

P. J. A. V. D. CAMMEN: LA GEEDZECO, LA KRISTANA GEEDZECO. Esperantigita de F-ino Truus Durenkamp. Esperanta Katolika Broŝuroj-Serio N-ro 2. Kinheim-Eldonejo, Heiloo. Paĝo 78. Formato 15.5×8.5 cm.

La dua broŝuro de la serio estas efektive daŭrigo de la unua N-ro. Tie ĝenerale estas preparolita la Dia volo en la kreado de la homo, ĉi tie ties laŭleĝa formo, la edzeco. La aŭtoro parolas pri la Dia institucio de la edzeco, per kiu Dio volis ligi la viron kaj la virinon en leĝa formo al unuigo morala. Cammen donas la plej superan eksplikadon de la edzeca vivo kaj asertas, ke la edzeco estas Dia alvokiĝo al tre nobla kaj sankta devo. Ne la malalta, volupta pasio serĉas kontentigon en la edzeco, sed Dia inspiro tiras la viron kaj virinon al plenumado tre serioza kaj al sankta devo en la edzeco: doni vivon kaj eduki la novan hometon al supernatura, religia vivo.

Tiel alta estas la sankteco de la edzeco, ke oni devas sin prepari al ĝi pere de »Gefianĉeco«. La ligo de la edzeco estas, laŭ la ordono de Kristo, sakramento, kiu peras Dian helpon kaj gracon. Tial benas la edzecon la paroĥestro antaŭ la altaro de Dio. Tiu sakramento havas sanktigan efikon, helpas en la plenumado de la edzeckaj devoj, fortigas la geedzojn en la rilatoj inter si, en la rilatoj kun la infanoj, sed precipe en la virtoj de la kristana edzeco. La eminenta aŭtoro parolas ankaŭ pri la modernaj malbenoj de la limigo de naskoj, pri la ekleziaj leĝoj de dureligia edziĝo, pri la registreja, ŝtata edziĝo, kaj laste pri la eksedziĝo. Ĉiam koncize li pritraktas la katolikan doktrinon rilate al ĉi tiuj demandoj. Tre bone fondita, klare kaj logike skribita verketo, ĝi valoras la tradukon! Ne nur katolikoj, sed eĉ alireligiuloj legos ĝin plezure, kiuj interesigas pri la doktrino de la katolika Eklezio pri tiu grava temo.

Pri la traduko ni povas diri preskaŭ la samon, kiel de la unua n-ro de la Broŝuro-serio. Kelkfoje la stilo Esperanta estas tiel komplikita, ke ĝi tuŝas jam la nekompreneblecon. Kelkfoje frazoj ne estas tute ĝustaj, kvankam la temo meritus pli fluan, facile kompreneblan stilon. Ni esperas, ke la lingva kontrolo de eminenta samideano zorgos pli poluritan tekston por la esperinde baldaŭna nova eldono.

Specialan atenton meritas la ekstera formo de la Broŝuroserio. La broŝuroj estas vere perloj de la Esperanto libroeldono. Tre zorgeme presitaj, belaspektaj broŝuroj, ornamitaj per diskrete bela desegno; tiel arte ili efikas, ke ni devas esprimi nian plenan dankon al la redaktoro kaj eldonejo. Ni estas certaj, ke la religiema legantaro de nia esperantistaro treege ŝatos la broŝurojn kaj volonte subtenos per legado kaj disvastigado ĉi tiujn belajn, ĉarmajn, valorajn verketojn.

Prof. Dro F. Erdey.

WILLIAM E. WILSON: LA KVAKERISMO. Religio sen ritoj. 1934. Kvakera Esperantista Asocio, 110. Kineton Green Road, Olton, near Birmingham, Anglujo. 10-paĝa kajereto. Prezo 2 pencoj.

La kajero pritraktas la historion de la fondinto de la religia societo »kvakeroj« (amikoj) kaj de ties ĉefaj doktrinaj. Ili mem protestas kontraŭ doktrinaj, sed ilia »kredkonfeso« estas tamen ankaŭ speco de doktrino. La fondinto, Georgo Fox, spertis, ke Jesuo ne estas nur historia figuro, sed vivas ankaŭ nun kaj parolas en interno de la homoj sopirantaj. Por tio ne necesas dogmoj, ritoj kaj pastro. La kvakeroj ne volas regi ies religion vivon, ĉiu havu mem proprajn spertojn. Laŭ ilia difino »Kristano ne estas tiu, kiu akceptas tiun aŭ alian religion, sed tiu, kies vivon gvidas la Spirito de Kristo«. Ilia kelkcent-jara agado en Anglujo multon alportis por doni moralan bazon al angla komerco, kaj la kvakeroj batalis plej forte kontraŭ sklaveco en la kolonioj kaj en Ameriko. Ili estas kompreneble pacifistoj, ĉar ĉiu ajn milito malkonfesus Kriston. Por ili ĉio bona kaj justa kaj servanta la homaron — do ankaŭ Esperanto — estas »la laboro, al kiu Dio vokis ilin«. Sed se iaj ritoj helpas iun dediĉi sian

vivon al Dio, »ili ne disputas«. Ili ja ankaŭ kunvenas, por kune sperti la ĉeeston de Dio, kiam en la komuna silento ne pastro, sed iu ajn, kies koro estas tusita, preĝas kaj faras paroladon. Ili ne volas gajni membrojn aŭ iun forlogi de sia religio, ili volas servi Dion kaj la homaron, disvastigante tion, kion Dio al ili diras en la koro. P. B.

TIU CI KORO... (Korforma maldika papereto.) Eldonis »Esperanta koro«, Dubrovnik, Jugoslavija. 10 por unu resp. kup.

La paperetoj aperis en lingvoj angla, franca, germana, itala, ĉeĥa, la alia flanko estas en Esperanto.

Ĝi estas alvoko, kiu celas, ke oni forigu la kalumniadon, kaŭzantan tiom da mizero en la nuna tempo kaj esti homfrato! Oni kunportu la koron, promesante, plenumi la alvokon. Kaj se iun ni renkontas, kiu kalumnias, kritikis, do preparas bataladon, ni donu al li la koron. Eble ĝi efikos! — Jam hungara ĵurnalisto verkis pri la paperkoretoj artikolon, deklarante, ke ĝi estas naiva afero, kaj tamen en la nuna kaoso, kiam racio kaj organizoj ne helpas, eble tiaj simplaj aferoj estas la lastaj helpiloj — li skribas — por malhelpi la katastrofon de la kulturhomaro. Vere la ideo pri amo kaj frateco estas ne nova, ĝi eĉ ne estas Esperanta eltrovaĵo, ĉar ĝi enestas en ĉiuj religioj kaj plej pure, plej simple ĝin por la mondo deklaris Jesuo. Ni kore deziras al la koretoj vastan sukceson. P. B.

JUBILEA JARLIBRO DE LA ESPERANTO-MOVADO 1937. Universala Esperanto-Asocio, Genève, Svislando. Palace Wilson.

Nur nun ni havas okazon recenzi ĉi tiun gravegan dokumentaron de nia movado, kiu pretiĝis kiel jubilea jarlibro de la 50-jara ekzisto de nia lingvo. Ĝi enhavas ekde la himno esperantista vere en nuksoĉelo la plej gravajn historiajn datojn, nomojn de la Esp. movado, montiras fidindan spegulon pri ĝia evoluo kaj pri tio de UEA, pri nia literaturo, la liston de la plej gravaj tradukoj el diversaj lingvoj, esperantistan panteonon de la pioniroj, interesan resumon bibliografian pri la teknikaj vortaroj, pri la universala ŝlosilaro (Cefec) fine la historion de la interŝtata Esperanto-Akordo pri la Enkonduko de Esp-o en la lernejojn.

L. Halka.

MEJIKO KAJ KARDENAS. Kritiko de Jesus Amaya. 1937. Broŝurita, ilustrita. Editorial Lumen, Mejiko Ap. 59. Formato 19×14 cm. Paĝoj 116. Prezo dol. 0.40.

Kritiko Socio-Politika de la Pasinta kaj Nuntempa Meksika Vivo.

La libro temas precipe pri la vivo kaj agado de la fama diktatoro de Meksiko, pri Kardenas, kiu estas laŭ la libro tre populara homo, ĉar lin ne devas konstante akompani korpgardistoj, sed li tute senĝene intermiksiĝas kun sia popolo. Bedaŭrinde mi ne povis ĝui la libron, ĉar ĝi havas tre malbonan stilon kaj en ĝi svarmas gramatikaj eraroj. Se iu verkas ion en Esperanto, estas la minimuma devo, laŭ mia opinio, ke li bone ĝin konu kaj regu.

L. Halka.

P. G. WODEHOUSE: LA PRINCO KAJ BETTY. Eldonas: The Esperanto Publishing Co. LTD. Anglujo. Epoko-Serio. Broŝurita. 192 p. formato 18×11.5 cm. Prezo: 2 ŝ. 6 p. Tradukis el la angla: G. Badash.

Jen ankaŭ en Esperanto aperas en tre bela eldono la t. n. faciltona legaĵo, kiu estas interesa, humora kaj sen ia literatura pretendo. P. G. Wodehouse estas jam mondfama kaj kiuj ŝatas la interesan, sed sekan anglan humoron, la strangajn figurojn kaj situaciojn, tiuj certe trovos grandan ĝuon en tiu ĉi romaneto, kiu cetere aperis en tre bona traduko.

László Halka

ĈU VI KONAS ITALION? Ente Nazionale Industrie Turistiche, Ferrovie Dello Stato.

32-paĝa fotokajero kun aparta titolpaĝo, eldonita de la italaj ŝtataj fervojoj kaj prezentanta veturon tra Italio, montrante la restadon, amuzadon, sportojn, festojn, produktojn, malnovan kaj novan Italion per belegaj fotoj. Tre valora kaj rekomendinda kajero, pli ol ordinara prospekto.

AL VIENO DUM ĈIUJ SEZONOJ.

16-paĝa faldprospekto pri la metropolo Vieno kun desegnaĵoj. La detala enhavo estas valora. Sed kial uzi desegnaĵojn, kiam en modernaj kajeroj tiom imponas la fotoj. La kajeron eldonis la Fremdulicejo de la urbo Wien, VII., Mariahilferstr. 2. — Ĉu aperos sekvonte tie simila en Esperanto?

MONDO SEN MILITO. Alvoko al la kristanaj eklezioj en ĉiu lando. 4 paĝoj. (12 pecoj 4 pecoj.) The Friends Peace Committee, Friends House. Euston Road, London NW. 1.

La kristanaj eklezioj devas publike kondamni ĉiun militon! Jen fundamenta paĉprincipo de Kristanismo. Sed tio estus nun tre heroo ago por la eklezioj kaj ni dubas, ĉu ili kuraĝos publike akcepti la alvokon.

LA KVAR SEZONOJ EN ITALUJO. 32 grandaj paĝoj kun fotoj kaj kolorreproduktaĵoj, aparta titolpaĝo.

Eldonita de la »Ferrovie dello stato« (Statfervojoj) en Italujo. Kajero, pri kiu ni devas fieri, ĉar ĝi superas multajn multkostajn literaturajn eldonaĵojn. La belaj fotoj, interesa enhavo, kiuj prezentas la vivon, pejzaĝojn, trezorojn de Italujo, donas artan ĝuon kaj vere allogas al vizito. Ĝi pruvas fortan uzon de Esperanto per ŝtato por siaj celoj, sed ankaŭ por la ĝenerala celo: alproksimigi per Esperanto la konon de fremdaj popoloj kaj regionoj!

P. B.

FELIX TIMMERMANS: KRISTNASKA TRIPTIKO. El la flandra: E. Paesmans. 44 paĝoj. Eldonaĵo de FUKU, Antwerpen. Formato: 16×10 cm. Prezo: gld. 0.50.

Tre ĉarmaj kristnaskaj legendoj, trateksitaj de popolaj kredoj. La lingvo de la traduko estas flua, tamen ni rimarkigu, ke ofte estas uzata kondicionalo anstataŭ la futuro. Sur paĝo 10. anstataŭ »eknombri« ĝustas »kalkuli«.

J. A.

GUNNAR FURHAMMAR: LA RELIGIAJ CIRKONSTANCOJ EN SVEDUJO kaj ilia influo al popolmovadoj kaj kulturo. Kun fotoj. 48 paĝoj. Eldonis: Svenska Missionsförbundets förlag, Stockholm. Prezo svfr. —.75.

La verketo celas konigi ion el Svedujo, ĉar la aŭtoro opiniis, ke pro nekomprene de la lingvo, kiel ĉiu malgranda lando, ankaŭ Svedujo, ĝia spirita vivo, kulturo estas tre malmulte konata en aliaj landoj. La verketo bone plenumas tiun ĉi taskon kaj vive montras la influon de la religia vivo al la svedaj kulturo kaj popolo, prezentante ankaŭ la historion kaj evoluon de la eklezioj kaj ilian laboron sur kultura kaj misia kampoj. La libreto taŭgas por pruvi la gravecon de Esperanto al laborantoj en religiaj aferoj, ĉar ili povas per tio multon lerni, studi kaj kompari kun la cirkonstancoj en la propra lando. Ni ekkonis ankaŭ la influojn sociajn, edukajn kaj politikajn de la eklezioj kaj lernas, ke multajn idealajn movadojn, kiel la kontraŭalkoholan, la pacifisman, fondis kaj gvidas religiuloj. Aparta ĉapitro pritraktas la movadon de la sendiuloj. La lastajn vortojn ni pripensus: »Ĉio nun staras sub la signo de la mondkrizo. La malnova malaperas. La nova ankoraŭ ne estas formita, kaj kia ĝi estos, ni ankoraŭ ne scias. Ni scias nur tion, ke ni mem respondas pri ĝia formado.« Tiu respondecas estas necesega ankaŭ en nia movado!

P. B. Budapest.

FOIRO DE PARIS UNIVERSALA KAJ INTERNA-
CIA. 21. Majo—6. Junio 1938. 23, rue N. D. des Vic-
toires, Paris. 8 paĝa prospekto kun fotoj kaj granda
afiŝo kun surpriso: »Esperanto uzata« montras la prakti-
kan uzon de Esperanto. Aperis ankaŭ »Aĉetanta kartoj«
en Esperanto.

FOIRO DE BUDAPEST. 2 paĝa informbla folieto
pri avantaĝoj de la partoprenantoj.

FOTO-AFIŜO DE LA XXX-A UNIVERSALA KON-
GRESO EN LONDONO. La bela afiŝo montras la faman
anglan parlamenton.

LA MEDICINA CATALANA NRO aprilo—majo
1937. Granda, lukse prezentita volumo, en la fino de ĉiu
artikolo kun esperantlingva resumo. Nova pruvo pri tio,
ke nia lingvo ĉiam pli enpenetras en kuracistajn rondojn.
La volumo kostas pesetojn 3.50 kaj estas ricevebla ĉe la
eldonejo: Libreria Catalonia, Barcelona, Ronda Sant
Pere 3.

LABORISTA ESPERANTA MOVADO antaŭ la mond-
milito de G. P. de Bruin. Eldonis: Sennacieca Asocio
Tutmondo (Paris 67 av. Gambetta) prezo 4 fr. fr. 36
paĝa belaspekta broŝureto.

Bruin, la ĝenerale konata historiisto de la laborista
movado denove riĉigis nian primovadan literaturon per
valorega broŝuro. En flua stilo kaj kun lernolibra koncizo
estas rakontataj la okazintaĵoj antaŭmilitaj. Cetere la
tuta libreto portas la karakteron de lernolibro bone
uzebla en daŭrigaj kaj superaj kursoj. Kiu volas koni la
historion de la movado, tiu ne povas malhavi tiun ĉi
objektive verkitan libreton.

Emba.

A PRACTICAL COURSE IN ESPERANTO, la angla
variante de la ilustrita lernolibro de dr. F. Szilágyi, kun
la anglalingvaj klarigoj de Fred Wadham. Dua eldono,
15.5×23.5 cm. 100 paĝa. Eldonis The Esperanto Publi-
shing Co Ltd, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo. Prezo
1 ŝilingo 6 pencoj plus 2 pencoj por sendkostoj.

La sukceso de la kursmetodo de Szilágyi estas plu
nekontraŭdirebla. La libro nun jam aperis en ses lingvoj
kaj en tri el ili ĝi fariĝis la plej ŝatata kurslibro kaj en
la tri aliaj ĝi vendiĝas samritme, kiel la aliaj lernolibroj.
La libro tion meritas pro sia amuza kaj facila karaktero.

Estas certe, ke tiu ĉi jaro ankoraŭ prezentos al la
Esperantistaro kelkajn variantojn de la sama libro kaj per
tio ni povos atingi tre interesan kombinon de instruado:
lernolibran, nesupraĵan instruadon en sama kurso al plej
diverslingvaj kursanoj.

La libro kun la pasintjare aperinta daŭriga kurso de
la sama aŭtoro nun donas eblon al ĉiu lerni nian lingvon
amuze ankaŭ el lernolibro.

JARLIBRO DE SAT 1938. 15.5×23.5 cm. 32 paĝa,
eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris XX-e 67
avenue Gambetta. Nur por membroj de la organizaĵo.

La libreto enhavas statutojn de SAT, kelkajn interes-
ajn informojn el la laborista esperantista movado, abon-
kaj kotizarifojn, kelkajn enciklopediajn sciindaĵojn kaj
de almenaŭ unu adreson el ĉiu loko, kie SAT havas mem-
bron, aŭ oni trovas laboristan esperantiston. Tre taŭga
informilo pro tio por ĉiu, kiu apartenas al la laborista
esperantista movado kaj ĉar la kotizo estas tre malgranda,
certe neniu simpatianto rajtas forresti el la vicoj de la
Asocio.

LA AVENTUROJ DE L. R. M. STULTUŬOF 13 X-a
Originale verkita de F. V. Dorno, kun la ilustraĵoj de la
verkinto. 14.5×18.5 cm. 64 paĝa. Havebla O. E. L.
Mechelen, Battelschesteenweg 303, Belgujo. Prezo 3 pen-
coj anglaj.

La verkisto rakontas tre flue kaj lerte pri stultaj reĝ-
aj familioj kaj pri la multaj flatuloj kaj aventuroj, kiuj
al ili okazas. La rakontoj, mi jam diris, estas lertaj, la
stilo akceptebla, sed la tuta libro denove apartenas al tiuj,
feliĉe nun jam malmultaj, kiujn ni devas tre forte kon-
danni pro sia teknika malperfekteco. Jam pasis la tempo,
kiam Esperanta libro rajtis havi sur ĉiu sia paĝo prese-
raron, kaj tre ĝenan preseraron. Alia malbono de la libro
estas la trouzo de la kunmetitaj tempoj.

Sed cetere la libro amuzos ĉiun bonan respublikan-
ojn. La bonaj reĝpartianoj naŭzite formetos ĝin. Elektu
do laŭ tiuj konsideroj.

LA PROBLEMO DE LINGVO INTERNACIA, serio
de radioparoladoj faritaj de d-ro Bjorn Collinder. N-roj
14—15 de Muusses Esperanto Biblioteko. 13×19.5 cm.
64 paĝa. Prezo 0.35 ned. guldenoj plus sendkostoj. Dek
numeroj kune 2.50 guldenoj afrankita.

La bone konata verkisto pritraktas en dek mallongaj
kaj koncizaj ĉapitroj la tutan problemaron, kaj la libro
estas tre taŭga de la unua ĝis la lasta ĉapitro, eble escepte
kelkajn frazojn primovadajn, por esti bazo, eĉ ĉe preskaŭ
laŭvorta ripeto, por propagandaj paroladoj.

JARLIBRO DE LA INTERNACIA ESPERANTO-
LIGO 1938. »Nur por uzo de membroj«. Eldonis IEL,
Heronsgate, Rickmansworth, (Herts) Anglujo. Postfor-
mato. 350 paĝoj. Kotizoj: Membro kun jarlibro angl. ŝ.
4.—, MA 10.—, MAH 19.— MS 25 ŝil. — Petu pros-
pekton

Jen nova pruvo, ke la kunigita ligo de naciaj soci-
etoj kaj delegitoj progresas. La jarlibro estas pli vasta,
ol lastjare kaj aperis jam en marto, do sufiĉe frue. Ĝi
estas kun preskaŭ 90 paĝoj pli ampleksa ol en 1937 kaj
ankaŭ la delegita parto kreskis per 8 paĝoj. La enhavo
— eĉ se ne konsideri la kutinan adresaron de landaj,
fakaj societoj, gazetoj, delegitoj, lingvo-komitatoj —
estas valora por ĉiu esperantisto. Krom statutoj, regularoj,
konkursoj, servoj, nekrologoj ni povas legi raportojn pri
la movado en diversaj landoj, resumon de la ĝisnunaj
sukcesoj dum 50 jaroj, (grupigo de decidoj, ŝtataj, ofici-
alaj, ktp. uzoj, aproboj,) en radio, en lernejoj, komerco,
turismo. Do kompletigo de la enciklopedio! 26 paĝojn
ampleksas la raporto pri la varsovia jubilea kongreso.
En la nuna kaosa epoko la esperantistaro devus esti pru-
denta kaj altruista, eĉ per oferoj ĝi devus unuigi en unu
asocion ĉiujn fortojn. La jarlibro pruvus, ke ĉe multaj
estas la bona volo, tial oni subtenis IEL, malgraŭ tio, ke
la estraroj ankoraŭ ne povis interkonsenti. La esperantis-
taro do montras la deziron al komuna laboro. Montru
tion ankaŭ la estraroj! Se ili sincere kaj serioze volas, de
ili dependas la sukceso!

P. B.

Por kelkaj ŝtatoj estas certe interese scii, ke en la
delegitaro la judoj estas nur en tra malgranda procento
neprezentataj, kaj ekzemple en Hungarujo ilia nombro
ne superas la procenton lege fiksitan en tiu ĉi ŝtato.